der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

22. Jahrgang | Nr. 135 (1/1986) | ISSN 001 4-0619 | 30 Pf

Nova ŝanco por terminologio

1. Faka apliko kaj terminara kaoso

Por ĉiuj esperantistoj, precipe la novaj, gravas la demando: por kio mi lernas la lingvon, kiel mi utiligu mian scion? Ĉu ĝi servas ne nur al kongresa babilado kaj koresponda spertinterŝanĝo pri vetero kaj personaj vivkondiĉoj — aŭ alivorte: ĉu Esperanto taŭgas por profunde trakti specialajn temojn el miaj profesia aŭ ŝatokupa sferoj? La respondo konatas: principe jes . . .!

Principe jes, se ekzistus terminaro pri koncerna fako, se mi trovus en koncerna vortaro la terminojn, sen kiuj interkomunikado pri iu speciala tereno ne eblas.

Ĉar tiu manko evidentiĝis jam tre frue en la movada historio, esperantistoj-fakuloj jam antaŭ la 1a mondmilito komencis kompili fakvortarojn. Ili serĉis en la literaturo jam ekzistantajn esprimojn kaj kreis novajn vortojn, kie ili mankis.

Sed okazis, ke kolego el la sama fako, eble eĉ el la sama lando, ne sciante pri tia verko — aŭ ĉar ĝi ne kontentigis lian bezonon — kompilis kaj eldonis alian vortaron. Precipe en la lastaj jaroj tiel estiĝis multaj duoblaĵoj kaj sinonimoj, malhelpaj por faka komunikado kaj kompromitaj por Esperanto en ekstermovadaj rondoj. (Plej konataj ekzemploj: la batalo inter komputilo — komputoro — komputero k. a., resp. dato — datumo — dateno, donitaĵo)

2. Unuaj provoj pri kunordigado

Vidante la danĝeron, kiu tiamaniere minacas precipe internacian planlingvon, en la 50aj jaroj ISAE kaj la Akademio de Esperanto starigis Terminologian Centron, kiu sub gvido de R. Haferkorn (FRG) klopodis unuecigi la terminarajn laborojn por Esperanto. En 1970 R. Eichholz (Kanado) transprenis tiun taskon. Tradukante la germanan „Bilder-Duden" (FRG) al „Esperanta Bildvortaro" li kunlaborigis ĉ. 200 diverslandajn fakulojn. El la slipoj, per kiuj ili interŝanĝis siajn opiniojn, estiĝis, kvazaŭ krom-produkto, la „Slipara Vortaro".

Nun, en la 80aj jaroj, ekestis nova iniciato por kunordigi la pliiĝantajn, sed disajn kaj parte paralelajn klopodojn.

En la kadro de la Scienc-Eldona Centro de UEA (SEC) en Budapest kelkaj volontuloj starigis Terminologian Sekcion (TeS), kiu nun, post la — espereble provizora! — likvido de la Budapeŝta oficejo de SEC, rekte ligiĝas al UEA. La sekretario de TeS, Ivan Bujdoso, Budapeŝto, kolektas adresojn de interesitaj fakuloj por interkonatigi ilin kaj instigi al kunlaboro en internaciaj, fake specialigitaj terminografiaj komisionoj. Kiel unuaj formiĝas la komisionoj pri aeronaŭtiko, bibliotekscienco, (bio-)kemio, informadiko (komputiko, lumigado k. a.). En junio 1985 eldoniĝis la unua modesta cir-

kulero. Laŭ peto la sekretario sendas la unuajn bazajn normproponojn pri la procedo kaj principoj de terminarfarado kaj laŭformaj aspektoj de estontaj norm-terminaroj.

Por plenumo de pli ampleksa laborprogramo necesas mono, kompetenta kunlaboro de specialistoj kaj la aŭtoritato de renomaj Esperantaj institucioj.

3. Ekstermovada, internacia normiga movado

Kvankam esence grava por Esperanto, la problemo de internacia komunikado tamen ne nur koncernas nian Movadon.

En ISO (International Organization for Standardization), kiu de la 20aj jaroj okupiĝas pri objekt-normigo, oni sufiĉe frue eksciis, ke normigo de materialoj, substancoj kaj maŝinoj ne eblas sen interkompreniĝo pri la koncernaj nomoj. Tiel eldoniĝis, apud normoj pri grandoj, mezuroj kaj teknikaj detaloj de industriaj produktoj, ankaŭ normoj pri terminoj de diversaj fakoj.

Por ke tiuj terminaroj estiĝu laŭ unuecaj principoj, en 1936 eĉ fondiĝis speciala teknika komitato „TC 37" por ellabori gvidliniojn kaj terminologiajn principojn.

Krom ISO, en kiu nun 74 naciaj normkomitatoj kunlabore prizorgas preskaŭ ĉiujn (teknikajn) terenojn, specialaj organizaĵoj okupiĝas pri normigo en specialaj fakoj (IEC = International **Electrotechnical** Commission, IUPAC = International Union of Pure and Applied **Chemistry** kaj aliaj).

En ŝtatoj, kie regas du- aŭ plurlingveco, la konscio pri fakaj tradukproblemoj „laŭnature" estas pli evoluinta: en USSR kaj Kanado Akademio de Sciencoj respektive universitato okupiĝas pri terminologi-normigaj demandoj.

Grandaj industriaj entreprenoj, kiel Siemens kaj Philips, evoluigas proprajn terminologiajn datum-bankojn. Informojn kaj dokumentojn pri ĉiuj terminologiaj aktivecoj kolektas **Infoterm** (International Information Centre for Terminology), la internacia informcentro por terminologio, kiun Unesko kaj la Aŭstria Norm- Instituto (ON) en Vienno fondis 1971. Ĝia ĉefa tasko, apud dokumentado kaj informado, estas kunordigado de ĉiuj priterminologiaj klopodoj sur nia globo.

4. La pioniroj estis esperantistoj-esperantologoj

Ĉu estas hazardo, ke gvidan rolon en la evoluo de tiu-ĉi internacia terminologi-normiga „movado" ludis homoj, kiuj ne nur brile regis Esperanton, sed ankaŭ profunde estis studintaj ĝiajn strukturon kaj porterminologian taŭgecon? La plej elstaraj estis Eugen WÜSTER kaj Ernest DREZEN.

WÜSTER lernis Esperanton, tradukis plurajn beletrajn verkojn kaj kompilis 8-voluman Esperanto-germanan „Enciklopedian Vortaron" antaŭ ol li verkis doktorigan disertacion pri „Lingvonormigo en la tekniko". Tiu germanlingva libro, aperinta 1931, fariĝis la bazo por la plua evoluo de nova scienco, la „Ĝenerala Terminologio-Teorio" (Allgemeine Terminologie-Lehre; General Theory of Terminology — GTT). Tiu libro jam entenas la bazajn ideojn por la postaj pri-terminologiaj rekomendoj de ISO (TC 37), dum kies ellaborado en internaciaj kolektivoj Wüster estis la gvida kapo. Li ankaŭ instigis kaj energie akcelis la establon de Infoterm, kies honorofica direktoro li estis ĝis sia morto en 1977. Sed ankaŭ Ernest Karloviĉ DREZEN, Ĝenerala Sekretario de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU), fondinto de la sovetia interlingvistiko kaj aŭtoro de multaj artikoloj kaj monografioj pri la teorio de internacia lingva komunikado kaj la historio de planlingvoj, estis samtempe rekonata specialisto pri terminologiaj demandoj. Laŭ komisio de la Sovetia Akademio de Sciencoj li kuntradukis en la rusan la ĉefverkon de WÜSTER kaj skribis raporton, sur kies bazo 1936 ISO fondis sian pri-terminologian teknikan komitaton TC 37. De li ankaŭ originas la ideo pri internacia terminologia kodo. Tiun ideon WÜSTER dum plurjardeka okupiĝo evoluigis al tre ampleksa materialo, kiu nun, en la okdekaj jaroj, denove estas en aktuala diskuto.

5. Ŝanco por nova kvalito

La supre skizitaj faktoj en la Esperanto-movado restis vaste nekonataj. Esperanto ĝis nun evoluis precipe dank' al la beletro kaj ne utiligis siajn skemismajn avantaĝojn por modele sistemigita fakleksiko; esperantistoj ne povis utiligi la ŝancon, enviciĝi en la internaciajn strebojn ĉi-rilate helpe de tiaj „pontaj" eminentuloj kiel WÜSTER, DREZEN k. a. — la ekonomiaj kondiĉoj kaj la konscio pri la graveco de scienca-faka komunikado ne estis sufiĉe evoluintaj.

Sed lastatempe ie kaj tie kreskas la kompreno, ke tiel ni ne povos daŭrigi sen riski la ŝancon iam ludi seriozan rolon en ekstermovadaj sciencaj rondoj.

Necesas esenca reorganizado de la faka laboro, necesas verkado/tradukado (kaj eldonado!) de altkvalitaj enkondukaĵoj en bazajn sciencojn — kaj necesas serioza okupiĝo pri la subevoluinta faka leksiko sur la nivelo de aktuala internacia terminologio (scienco). Unua paŝo en la ĝustan direkton estas **rezolucio**, kiun akceptis la Komitato de UEA dum la 70a UK en Augsburg.
Jen la teksto:

„I Konsiderante
- — ke la scienc-teknika revolucio stimulas impete la evoluon de la faka lingvo,
- — ke por la estonta pozicio de Esperanto en la mondo de fundamenta graveco estas ĝia altkvalita apliko en scienco kaj tekniko,
- — ke tiu faklingva apliko de Esperanto en la postulenda kvalita nur eblas, se la terminologio respondas al la necesa nivelo kaj ke diletanteco kaj hazardeco de terminologia laboro grave endanĝerigas tiun kvaliton,

II Proponas al la Komitato, ke oni en la jaro 1987 fondu Esperantan termin-normigan instituton kun la ĉefaj celoj
- a) plibonigi kaj unuecigi la terminologian laboron,
- b) reprezenti Esperanton en internaciaj normigaj institucioj (ISO, Infoterm k. a.)

III Proponas al la Komitato, ke ĝi komisiu la Terminologian Sekcion de UEA (ĝis nun ligitan al la Scienc-Eldona Centro de UEA en Budapeŝto)
kunlabore kun kompetentaj esperantistaj institucioj
(Akademio de Esperanto, ISAE, CED, fakaj asocioj k. s.)
trovi la kompetentajn homojn, prepari la necesajn dokumentojn kaj entrepreni aliajn necesajn paŝojn por ebligi la fondon de tiu Esperanta termin-normiga instituto

IV Proponas estabi la „Fondaĵon Wüster" (fondaĵo terminologio) por certigi la necesajn financajn rimedojn por terminologiaj aktivecoj"

6. Ĉiuj povas kontribui

Surbaze de tiu rezolucio eblas la konstruado de pli solida, pli efika institucio ol povis ĝis nun rezulti el la klopodoj de bonvolaj unuopuloj. Sed la sukceso dependos de la preteco de ĉiuj kapablaj esperantistoj, doni sian specifan kontribuon por afero, kiu koncernas nin ĉiujn. Jen kelkaj ekzemploj, kiel eblas subteni la terminologi-normigan laboron:

6.1. organize-informe:
internacia (mondvasta) kunlaboro bezonas homojn, kiuj kapablas ĝin amplekse organizi. Ili devas akiradi kaj pludonadi ĝisdatajn sciojn pri terminologiaj teorio kaj praktiko (lernado kaj instruado), peri kontaktojn inter movadaj kaj ekstermovadaj instancoj, instigi esperantistojn-fakulojn al terminografia laboro kaj helpi/konsili al ili en organizaj demandoj;

6.2. terminografie:
la plej granda grupo da kunlaborantoj estos la fakuloj, kiuj konkrete prilaboros la terminarojn de siaj fakoj. Ili bezonas kaj superrigardan, kaj profundan scion pri

sia fako, ĝeneralan kleron kaj bonan konon de lingvoj (ne nur la gepatra kaj Esperanto, sed laŭeble ankaŭ aliaj); cetere tiu-ĉi tasko postulas precizecon, paciencon kaj **kun**-laboremon;

6.3. finance:

ĉar terminologia agado estas science fundamenta kaj la eldonado de (norm-)fakvortaroj — pro la relative malgranda uzantaro — ne povas esti enspeza, finance memstara entrepreno, la esperantistaro devos zorgi por la necesaj rimedoj. Kvankam la laboro de terminografoj (vd. 6.2.) kaj de organizantoj (6.1.) ne estos pagata, tamen ne eviteblas diversaj elspezoj. Mondonacoj de ĉiuj altecoj do estos bonvenaj.

6.4. aplike:

ne laste necesas, ke la estontaj normoj estas konataj, disvastigataj kaj aplikataj. Neniu ŝtata aŭ jura potenco povas devigi la homojn, ke ili uzu tiun-ĉi esperantan terminon kaj ne alian. Pro tio gravas tut-movada komprenemo, por ke fakuloj, (speciale aŭtoroj kaj redaktistoj) utiligu la terminarojn kaj apliku la normigitajn terminojn.

Jen nur kelkaj el la eblecoj por partopreni en la komuna plenumado de grava tasko. Se inter la menciitaj punktoj estas io por vi aŭ se vi havas aliajn ideojn por perfektigi la supran skizon — skribu al:

Ivan Bujdoso, sekretario de TeS,
TeS de UEA
H—1368 Budapest, Pf. 193

aŭ al mi:

Wera Dehler (estrarano de TeS),
DDR — 1141 Berlin,
Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113—05

PS: Por faciligi nian laboron, bv. laŭeble aldoni kopion de via letero!

Wera Dehler

D-ro Renato Corsetti

Esperanto en la „tria mondo": faktoj kaj sancoj

La aŭtoro estas estrarano de UEA, kaj de pluraj jaroj li okupiĝas pri la disvastigo de Esperanto en la tria mondo. La sekva artikolo estis verkita por „Hungara Vivo", aperis tie en 3/1981 kaj nun adaptita por „der esperantist" laŭ peto de nia redakcio.

Estas konata vero inter esperantistoj, ke Zamenhof sukcesis vivigi sian lingvon, ĉar li komprenis la fundamentan gravecon de la rolo de lingva komunumo, de la parolantoj de difinita lingvo rilate la destinon de la lingvo mem. Multaj esperantologoj konsentas pri tio, ke Esperanto postvivis sian iniciatinton ne pro struktura perfekteco, sed pro ekzisto de komunumo, kiu ligis al la lingvo ne-lingvajn idealojn. La tuta preskaŭ centjara historio de tiu komunumo montras ĝian rezistokapablon kaj ĝian konkero-kapablon. Temas, kompreneble, pri paca konkerado de mensoj, kie ajn sin prezentas ŝancoj por tio.

Ni plenrajte fieras pri la disvastiĝinteco de nia komunumo en miloj da urboj, kaj en dekoj da landoj: tiom pli ni rajtas fieri, se ni konsideras, ke ĝi estas rezulto nur de sindediĉo de centmiloj da homoj, kiuj laboris kaj plue laboras en tre malfacilaj kondiĉoj meze de indiferento kaj kontraŭ potencaj faktoroj. Tio, tamen, rilatas nur al la „unua" kaj „dua" mondoj, por uzi laŭmodan, neprecizan, sed tuj efikan disdividon de nia terglobo. En la „tria mondo" nia komunumo, kaj ĝia lingvo, estas tre subreprezentataj. En la unuaj jardekoj de ĉi tiu jarcento estis apenaŭ eble paroli pri la inter-

nacia lingvo al afrikanoj, azianoj kaj parte ankaŭ al sudamerikanoj. Ili havis tiom da pli urĝaj problemoj, ili apenaŭ „ekzistis", tio estas: la kultura vivo en tiuj landoj estis tute sufokata de koloniistaj elitoj, kiuj klopodis planti tie sian metropolan kulturon. Sed en la lastaj jardekoj, post la fino de koloniismo, afrikaj, aziaj kaj sudamerikaj landoj ekaperis en la internacia scenejo, kaj komencis vivi sian memstaran vivon eĉ se inter ĉiuspecaj problemoj. Prave, do, ĝuste en ĉi tiu periodo la Esperanto-movado venis al analizado de la situacio de Esperanto ekster Eŭropo kaj al klopodoj por ŝanĝi tiun situacion.

Ĉi tiu agado daŭras en la ĝis-nuna formo proksimume la lastajn dek jarojn,, kaj ni ekzamenos ĝin ĉi-sube post bird-okula trarigardo de la nuna pozicio de Esperanto en la priparolataj mondopartoj.

Azio

Esperanto eniris Azion jam komence de ĉi tiu jarcento, sed ĝi enradikiĝis kaj floris nur en kelkaj landoj: Ĉinujo, Japanujo, Vjetnamujo kaj Koreujo. En tiuj landoj nun ekzistas fortaj movadoj, kiuj sukcesas kontraŭpezi la forton de la movadoj en eŭropaj landoj.

En aliaj aziaj landoj estas nur sporadaj aretoj da esperant-lingvanoj, kaj en kelkaj kazoj nur malmultegaj izoluloj.

Lastatempe la movado vigliĝis en Hindujo, en Pakistano kaj en Irano. En Hindujo deko da lokaj Esperantogrupoj, lastatempe kuniĝintaj en landan federacion, estas parte fruktoj de la semoj plantitaj de sinjorino Haudebine (kiu vivis tie longajn jarojn) kaj parte rezultoj de la agadoj de entuziasmaj hindoj aperintaj dum la lastaj jaroj.

En Pakistano ekzistas promesoplena organizaĵo, kiu sukcesis eĉ eldoni lernolibron en la urdua, kaj jam disbranĉiĝas en kelkaj lokaj grupoj. La ekapero de amas-kaarktera movado en Irano antaŭ kelkaj jaroj estas ĉefe dankinda al la agado de unu homo, d-ro Saheb-Zamani, kiu kapablis utiligi sian socian prestiĝon por atingi amaskomunikilojn, universitatojn ktp. Pro la progresemaj, kontraŭimperiismaj idealoj, kiujn la irana movado havis de la komenco, ĝi travivis la nacian „revolucion" post la forpelo de la ŝaho. Espereble la evoluo de tiu lando ebligos plifirmiĝon de Esperanto post tiom flagra starto.

Arablingvaj landoj

Pro kialoj ne tute kompreneblaj la internacia lingvo neniam renkontis grandan simpation, lernpretecon, apogojn en mezorientaj kaj nordafrikaj arabingvaj landoj. Siatempe ekzistis organizaĵoj en Maroko kaj kursoj en Egiptujo, sed temis pri faroj de eŭropanoj loĝantaj tie.

En la nuna momento ekzistas nur ne organizitaj grupetoj de esperantistoj en preskaŭ ĉiuj tiuj landoj de Jemeno al Maroko, sed ili ne sukcesas vastigi sian nombron aŭ influon al la ĉirkaŭa socio. La plej agema rondo troviĝas en Damasko kaj laboras por pretigi Esperantan-araban vortaron. Kontaktoj kun la araba organizaĵo por kulturo kaj scienco (ALECSO) estas tre bonaj, sed ili ĝis nun ne portis konkretajn rezultojn. Male, en Israelo ĉiam estis relative forta movado. Kompreneble ĝi estas forŝlosita el kontaktoj kun esperantistoj en la najbaraj landoj.

Afriko

Afriko el nia vidpunkto estis ĝis antaŭ kelkaj jaroj nur insulo norde de Malagasujo. Fakte nur en Malagasujo, danke al la agado de kelkaj francaj esperantistoj en la 30aj jaroj, ekzistis relative vasta esperantlingva komunumo. Bedaŭrinde pro la granda distanco ĝi estas tute enfermita en si mem, kaj kiel okazas en malgrandaj fermitaj vilaĝoj oni ĉefe pasigas la tempon per internaj kvereloj. Ne pasas jaro sen fondo kaj malfondo de almenaŭ du novaj inter si rivalaj Esperanto-organizaĵoj.

Lastatempe sekve de kunordigita informkampanjo ekestis viglaj komencantaj movadoj kaj en la landoj de

la okcidenta kaj en la landoj de la orienta marbordoj.

Suda Ameriko

En multaj sudamerikaj landoj vivas mult-nombraj esperantlingvaj komunumoj. Foje, laŭ nombro, la tiea movado superas tiun en pluraj okcident-eŭropaj landoj. Ilia ĉefa problemo estas la malproksimeco de la movadaj centroj kaj la sekva manko de sento pri aparteno al tiu tutmonda movado. Malgraŭ niaj pretendoj al solvado de ĉiuj mondaj problemoj per la internacia lingvo, ni ofte eĉ ne sukcesas solvi problemojn de interkompreniĝo kaj interproksimiĝo en la movado mem. Libroj eldonataj en Eŭropo tre malrapide kaj en ne sufiĉa kvanto atingas Brazilon aŭ Japanujon kaj inverse.

La Universala Kongreso en Brazilo helpis proksimigi la sudamerikajn esperantistojn al la alikontinentaj, kaj helpis almenaŭ konsciigi la eŭropajn esperantistojn pri la ekzisto de fortaj Esperanto-komunumoj en Suda Ameriko.

Pasinta kaj estonta agado de UEA-TEJO

Dum la lastaj jaroj la agado de la centraj instancoj de la movado baziĝis sur sistema kuraĝigo de la kernoj agantaj en triamondaj landoj. Oni korespondis kun ili, konsilis ilin, sendis al ili informan kaj instruan materialon. Temis pri „rutina" agado, kiu montras siajn rezultojn nur en la daŭro de la tempo. Ĝi ne apartenas al tiuj agadoj, kiuj promesas „la finan venkon" dum la posta monato, nek al tiuj agadoj, kiuj celas atingi tujan kaj grandan prestiĝon por la lingvo (agnosko fare de ŝtat-prezidantoj, funkciuloj de internaciaj organizaĵoj ktp.).

Ĉio-ĉi kune kun sendado de lernolibroj al ĉiuj triamondaj inform-petintoj, portis kelkajn rezultojn, kvankam ankoraŭ malgrandajn kaj ne ĉiam rekte atribueblajn al tiu agado.

Ni citu nur unu ekzemplon. La Esperanto-movado en Kubo jam organiziĝis kaj ĝi aliĝis al UEA kaj ekpartoprenas la internacian esperantlingvan vivon. Certe tio ŝuldiĝas al la favoraj cirkonstancoj en Kubo, al la laboro de kelkaj tieaj entuziasmuloj, al la favoraj reeĥoj el socialismaj landoj, kiujn ricevis kubaj registraraj instancoj okupiĝantaj pri la problemo. Sed tio parte ŝuldiĝas ankaŭ al la daŭra kontaktado de kubaj esperantistoj fare kelkaj funkciuloj de UEA-TEJO jam de antaŭ dek jaroj. Oni sendis hispanlingvajn librojn, vortarojn, informilojn. Oni daŭre sekvis la evoluon kaj klopodis reflamigi estingiĝontan vervon, trovi la financajn rimedojn por helpi en ĉiu ebla maniero. Kaj jen finfine venas rezulto.

Same, kiam Hinda Esperanto-Asocio (aŭ Federacio de Esperanto en Bharato, aŭ la nomo, kiun ĝi alprenis) paradas en la jarlibro, oni certe ne rajtas forgesi, ke por tio kelkaj homoj jam laboras de jardekoj.

Turnopunkto por la priparolata agado estis kunveno pri „Landa Agado" (tio estas la ne tuj signifomontra kodnomo, kiun aktivuloj uzas) okazinta dum la Universala Kongreso en Stokholmo. Tie oni decidis aldoni al la „normala" respondado al informpetoj kaj alsendado de instrumaterialo al petintoj, novan pli aktivan agad-branĉon.

Esence temas pri „atako" de nur unu-du landoj en ĉiu kontinento ĉiun jaron pere de inform-kampanjoj lanĉataj el Eŭropo. Praktike oni aperigas serion de gazetaj anoncoj kaj artikoloj en la cel-landoj, kaj respondas ilin per lernolibroj kaj informiloj. Ne ĉiuj ricevantoj de tiuj lernolibroj lernas, sed ankaŭ ne ĉiuj ricevintoj de la unua tia dissendo farita de Zamenhof lernis. La rezultoj, ĉefe en Afriko, ne mankas.

Intertempe ankaŭ la „tradicia" agado estis rearanĝita por atingi pli da efikeco. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj nur unu komisiito faris la korespondan laboron, dum la Centra Oficejo faris la enpakan kaj sendan laboron. La mono por la tuto venis el la Fondaĵo Azio-Afriko. Nun kvar homoj respondecas pri rilatoj respektive kun Azio, arablingvaj landoj, Afriko kaj Suda Ameriko. Krom

la Fondaĵo Afriko-Azio plufunkcianta en Roterdamo ĉe la Centra Oficejo, alia Fondaĵo starigita en Tokio ĉe Japana Esperanto-Instituto, sed kun partopreno de ĉiuj japanaj esperantistaj organizaĵoj liveras la financajn rimedojn. Finfine japanoj sukcesis organize konkretigi sian intereson je la disvastiĝo de Esperanto en aliaj aziaj landoj. Ne subtaksinda, kaj ne subtaksata estas la kontribuo, kiun povas doni esperantistoj kaj esperantistaj instancoj en socialismaj landoj.

Budapeŝto jam disponigis sian preskapablon por kamboĝa vortaro kaj por vjetnama lernolibro. Ĉeha Esperanto-Asocio siatempe disponigis centojn da „Paŝoj al Plena Posedo" por triamondaj esperantistoj. Bulgara Esperantista Asocio pretas helpi kaj por la vjetnama lernolibro kaj por turklingvaj lerniloj.

Siatempe jugoslavoj ankaŭ destinis parton de la mono restinta post la Beograda kongreso al Fondaĵo Evolulandoj, kiu helpis financi eldonon de lernolibroj en kelkaj lingvoj.

Sed ekzistas ankoraŭ grandaj agadeblecoj, ankaŭ por unuopaj esperantistoj kiuj minimume povus sisteme korespondi kun triamondaj esperantistoj por helpi ilin eliri el sia izoleco, kaj ligi tiujn homajn rilatojn, kiuj estas la plej bona garantio pri plua restado en la movada komunumo.

Varbado de triamondaj studentoj, kiuj multas en ĉiuj socialismaj ĉefurboj, estas alia agad-kampo.

—

Kial ĉi tiu agado?

Ofte oni aŭdas kritikojn pri la koncepto mem, sur kiu baziĝas ĉi tiu tuta agado. La plej bona maniero por konvinki afrikanojn — oni argumentas — estas laborado por ke Esperanto grandskale akceptiĝu en Eŭropo. Tiam aliaj kontinentoj sekvos. Ĝis nun ili ja ĉiam sekvis nin.

Certe, se morgaŭ eŭropaj registaroj decidus enkonduki Esperanton en ĉiujn lernejojn, tio fortigas la pozicion de nia lingvo ankaŭ en aliaj mondopartoj, sed ... Unuflanke ŝajnas preferinde apogiĝi sur la propraj fortoj, kiuj povas porti al pli firma progreso ol eble neniam venontaj registaraj decidoj, kaj aliflanke necesas jam konvinkiĝi ke la mondo iĝas pli plurcentra kaj ke ne necese iu antaŭiras kaj iu alia sekvas.

Esperanto estis iniciatita kiel tutmonda lingvo, kaj ĝi pluhavas ĉi tiun universalisman pretendon. Ĉi-cele iĝas pli kaj pli mallarĝaj niaj horizontoj kaj maladekvataj niaj fortoj, se ni daŭre priatentas nur la malnovajn mondopartojn. Jam nun ĉiuj internaciaj organizaĵoj (UNO, Unesko ktp.) havas pli larĝan membro-bazon ol nia UEA, kaj tio estas tre danĝera signo.

Ĉu ekzistas sukcesoŝancoj por tia agado? Ĉu ni, kiuj malsukcesas disvastigi Esperanton en, ekzemple, Svisujo, povas sukcesi en Nepalo?

Kun ĉiuj eblaj limigoj, mi tamen respondas, ke jes. Niaj ĉefaj aliancanoj en tiuj landoj estas la „freŝeco" la manko de antaŭjuĝoj, la lernemo, la sincera deziro je progreso de la tieaj homoj.

Ni ne forgesu, ke similaj faktoroj estis tiuj, kiuj permesis la ekeston de nia movado fine de la pasinta jarcento en Eŭropo inter la laborista kaj etburĝa tavoloj de la tiamaj socioj.

13a plenkunsido de la Centra Estraro de GDREA

Laŭ sia laborplano la Centra Estraro de GDREA okazigis sian laŭvican 13an plenkunsidon la 21an kaj 22an de novembro 1985 en Cottbus. Laŭ la tre plena tagordo la membroj aparte okupiĝis pri la aktualaj aktivaĵoj kaj problemoj de GDREA sur distrikta ebeno. Raportis la prezidantoj de la Distriktaj Estraroj. La multaj informoj aŭskultitaj montras, ke GDREA en multaj distriktoj — se ankaŭ ne en ĉiuj — havas pli kaj pli konsiderindajn rezultojn. Aparte ĝojiga estas la fakto, ke la Junulara Komisiono ĉe la Centra Estraro de GDREA rimarkinde ekaktivadas. Pluaj informoj kaj raportoj rilatis al nova centra koresponda kurso ekde 1986, problemoj de la agado de MEM en GDR, raporto pri la 70a Universala Kongreso de Esperanto, pri IMEK V kaj pri multaj aliaj aktivecoj.

Ion fari por Afriko!

En Universala Esperanto-Asocio ekzistas komisiono, kiu aparte okupiĝas pri disvastigo de Esperanto en afrikaj landoj. Ĝin gvidas Hans Bakker el Nederlando (adreso sube).

Ni represas kelkajn koresponddezirojn de junaj afrikaj esperantistoj, kiuj havas malsaman lingvan nivelon. Ligante kontaktojn kun ili konsideru la atentigon de Hans Bakker:

„Kiel kunlaboranto de UEA pri Afriko, mi ofte ricevas petojn de Afrikanoj kiuj tre deziras rilati kun homoj en aliaj kontinentoj. La korespondado estas por ili la sola maniero por havi kontaktojn kun aliaj esperantistoj, kaj tre gravas fidela, ofta, amika skribado. La poŝto estas tiel malakurata, ke daŭras monatojn ĝis venas respondo, kaj ne malofte la leteroj tute perdiĝas. Tial oni devas konservi kopiojn de siaj leteroj, kaj fari fotokopion por denova sendo, se iu letero perdiĝis.

La afrikaj lernantoj, izolitaj, lernantaj nur perkoresponde, ne havas facilan vojon por lerni la lingvon. Tial ilia lingvaĵo ofte estas neperfekta. Vi povas, se ĝentile kaj stimule (ne kritike), helpi en la plibonigo de la lingvo-uzo. Kaj skribu mem en **senerara**, simpla, klara Esperanto. Malfacilajn vortojn traduku, aŭ eĉ donu tutan tradukon de via letero en angla aŭ franca lingvo, se la korespondanto estas ankoraŭ komencanto.
Se ekestas kontakto, mi volonte ricevos informon pri la evoluo de tiu kontakto. Nur tiel mi povas ĝisdatigi mian administradon, kiu servas por konduki la afrikajn lernantojn kaj subteni ilin kiel eble plej trafe. —
Pri eventualaj bonaj kaj nebonaj spertoj en la kontaktado kun afrikaj korespondemuloj, mi volonte restos informata. Viajn raportetojn ĉiam tre ŝatas ricevi: H. Bakker, Kastelenstraat 231, 1082 EG Amsterdam, Nederlando. Dankon!"

Recenzo

Corsetti, R. / La Torre, M. / Vesella, N.: Esperanto. Corso di base. Edistudio Pisa 1984. ISBN 88-7036-016-4, 302 p., 210 x 150
La tri aŭtoroj prezentas la nuntempe verŝajne plej modernan ital-lingvan lernolibron de Esperanto.

Ĝi enhavas enkondukon pri la lingvopolitika fono de la Esperanto-movado de G. R. Cardona, mallongan klarigon pri la prezentoformo flanke de la aŭtoro, 15-lecionan kurson (p. 19 — 253), liston de la uzitaj morfemoj (radikoj, finaĵoj, afiksoj) kun indiko de uziteco, indekson de uzitaj gramatikaj terminoj, fontaro de la tekstoj kaj (ege magran) bibliografieton pri gramatikoj, vortaroj kaj esperantologiaj-interlingvistikaj verkoj studindaj post la kurso.

I. a. du trajtoj distingas la verkon: la aŭtoroj klopodas konsciigi al la lernantoj lingvan mekanismon, ekzemple tre klare montrante la vortfaran sistemon surbaze de la semantikaj ĉefkategorioj.

Due, la tekstoj ne estas, kiel ofte en lernolibroj stultaj aŭ enuaj. Ili estas aktualaj, prenitaj el al socipolitika vivo. Ĝenerale la aŭtoroj klopodas ne nur peri lingvajn strukturojn sed ankaŭ enhavojn, nome progresemajn enhavojn. Tiel oni trovas leteron el Vjetnamio, tekstojn pri la laborista Esperanto-movado, pri strikoj (en Italio ofta fenomeno), pri problemoj de latinamerikaj landoj, pri lingvopolitikaj temoj. Sed ankaŭ ne mankas humuraĵoj. La lecionoj ĝenerale komenciĝas per teksto kun sublinia preciza laŭvorta itala kaj apuda bonstila tradukoj. Sekvas gramatika parto kaj ekzercaĵoj.

La lecionoj enhavas tri ebenojn. Okupiĝante pri la teksto kaj la gramatiko oni ricevas bonan superrigardon pri la lingvo. Sufiĉe bonan pasivan scion oni akiras ankaŭ tralaborinte la ekzercojn de la unua ŝtupo (esercizi). kaj aldonante ankaŭ la duan ŝtupon de la ekzercaĵoj (gli esercizi di approfondimento) oni atingas — laŭ la aŭtoroj — certan aktivan lingvoscion, ĉar aparte tiuj materialoj ekzercigas frazstrukturojn kaj postulas respondon de diversaj demandoj.

La lernolibro uzas entute ĉirkaŭ 1600 morfemojn.

D. Blanke

Komputista Fakgrupo en GDREA

Sub gvido de Michael Behr 12 kolegoj kunsidis la 23an de novembro 1985 en Cottbus, prezentis kelkajn fakprelegojn (Rolf Bethke, Elmar Starke, d-ro Paul String), diskutis pri terminologiaj demandoj kaj pri la estontaj aktivaĵoj de la grupo.
Rimarkindas la pli kaj pli forta disvastiĝo de la valorega fakĵurnalo „Internacia Komputado". Tiu revuo aperas jare per 4 kajeroj kaj estas abonebla ĉe Michael Behr (7113 Markkleeberg, Koburger Str. 83) kontraŭ 24 markoj.

Leteroj pri „Propraj nomoj“

Ĉu vere „manio kripligi proprajn nomojn“?

(Letero de leganto)

Fermante la favoran recenzon pri „Pendumilaj lidoj“ (**„Der Esperantist,** 1985, 42), d-ro **Blanke** ne sukcesis subpremi la tenton kaj malkaŝis al ni, kio pleje ĝenas lin ĉe prof. Ŝulco: „Bedaŭrinde iom makulas la manio de Ŝulco, kripligi proprajn nomojn. Verŝajne ‚Kristiano Morgenŝterno‘ — se ankoraŭ vivanta — pri tiu kripligo skribus poemeton.“

Nu, mi koncedas, ke la poeto Morgenŝterno verŝajne apenaŭ preterlasus tian okazon por satiri. Sed se oni jam fantazias, oni ankaŭ bonvolu imagi, ke laŭ Morgenŝterno estus baptita plantospecio „morgenŝterno ŝulca“ (latine: **Morgensternia schulziana)**. Aŭ estu ĉu mineralo „morgenŝternito“, aŭ ĉu teĥnika procedo „morgenŝternado“ ...

Sed serioze: La proprajn nomojn Esperanto ofte devas asimili, t. s. certagrade „kripligi“. Ĉu Aristotelo do estas „kripligo“ de Aristoteles? Oni laŭdu provojn sur ĉi kampo. Kvankam eble oni ne konsentos pri ĉiuj tiaspecaj esperantigoj fare de prof. Ŝulco, tamen lia iniciato ĉial estas aprobinda. Eleganta lingvostilo malfacile kreiĝus sen asimilitaj onomastikaĵoj. Jes, ankoraŭ longe daŭros, antaŭ ol en Esperanto stabiliĝos reguloj por asimilado de propraj nomoj. Ekz. **Michel Duc Goninaz** (Esperanto, 19-85, 52) uzis la adjektivon „varingjena“, dum la internaciaj terminologiaj normoj rekomendus la grafisman formon „varingiena“. Nu, ne gravas, iom post iom kristaliĝos ordo.

Male, la redakcio de **Der Esperantist** ŝajnas preferi la ĝisnunan ĥaoson, ol establi kontentigan ordon. Jen ekzemploj el p. 45: (+ = linio de supre, — = linio de malsupre)

+1 Kontrakto inter **Leipzig** kaj Kievo (Mi demandas: Kial ne Lejpcigo?)

+3 Ukrainio (Kial ne Ukraino, laŭ la originalo? **Ukraina** = Randlando)

+16 kiev-aj partneroj (Kial ne: kievaj?)

+43 Societo por Internacia Amikeco de Ukraino (Kial ĉi-okaze la ĝusta formo?)

+46 ukraina filio de ASE (Tio ĉi estas la ĝusta adjektivo)

+61 Kiev-a (Kial ĉi-okaze la majusklo kaj la ligostreketo?)

—11 Por la Kieva Esperanto-Klubo (Jen la pli natura formo senstreketa)

Resume: Kiu esperantisto ĝojus pro tiaspeca malordo?

J. Kavka, Praha

El letero de Germain Pirlot, Belgio

„Vian raporton pri ‚20 jaroj Eo en Kulturligo‘ mi atente legis (**Der Esperantist**, n-ro 131, pp. 53—54). En punkto 6 vi mencias tri beletrajn verkojn, kiujn mi aĉetis; sed, se mi plezure legis ‚Nuda inter lupoj‘ kaj ‚Trigroŝa romano‘, mi ne kapablis legi pli ol deko da paĝoj en ‚La perdita honoro de K. B.‘. Per FANATIKA esperantigo de propraj nomoj R. Schulz forigis la germanecon de tiu verko, kiu sekve, por mi, fariĝis senvalora. Per tia stulta traduko „Ŝulco“ (kiu eble hontas pro sia germaneco) neniigis germanan etoson; tiuokaze Eo ne rolis kiel ‚kulturneniigilo‘. Laŭ mi, tio estas ege bedaŭrinda ĉar, krome, tio supozigas ke celo de esperantistoj estas la forigo, la neniigo de aliaj lingvoj, de aliaj kulturoj laŭ la slogano ‚Unu mondo, unu lingvo‘.

Male, en ‚Trigroŝa romano‘ oni retrovas anglan etoson dank‘ al propraj nomoj, ekzemple ‚Eastman, Coax, Fanny, Macheath, Fewkoombey ...‘; en ‚Nuda inter lupoj‘ kontribuas al internacia medio nomoj kiel ‚Höfel, Runki, Bochow, Kropinski, André, Zweiling, Hortence, ...‘. Sekve, Apitz kaj Brecht troviĝas en mia biblioteko kaj Böll trovis la vojon al mia rubujo!“

„PRESAGENTEJO", „NOVAĴAGENTEJO" AŬ „INFORMAGENTEJO?

Tiu ĉi demando estis levita fare de konata esperantisto, kiu, kiel profesia radiožurnalisto, daŭre okupiĝas pri la speco de aktualaj informoj troveblaj en ĵurnaloj kaj gazetoj, kaj ankaŭ en aliaj komunikiloj kiel filmoj, radiofonio kaj televizio. Kiu jam legis mian artikolon titolitan „Preskonferenco — barbarismo en Esperanto" (**„Nitra Informilo"**, 1983, n-ro 6, decembro, pĝ. 3 — 5) scias, ke la uzo de la radiko „pres-" kun la signifo „gazeto", „informo", „novaĵo ks. estas erara. Jen resumo de mia klarigo.

Laŭ **Plena Ilustrita Vortaro** (PIV, 1970) „preso" signifas „ago de tiu, kiu presas". „Presi" en la sama vortaro estas difinita jene: „reprodukti per gravuritaj tabuloj aŭ metalaj literoj, ŝmiritaj per inko". PIV informas ankaŭ, ke „agentejo" estas oficejo, regata de unu aŭ pluraj agentoj, „personoj, komisiitaj de iu, por konstante fari ion". Ĉu, do, presagentejo estas oficejo, kies dungitoj konstante presas? Tute ne! La funkcio de la koncerna agentejo estas kolekti kaj distribui al diversaj komunikiloj informojn pri lokaj kaj internaciaj eventoj. Inter la famaj entreprenoj, plenumantaj tiun servon estas Associated Press (Usono), Reuter (Britio) kaj TASS (Sovetio).

Por decidi, kiel plej trafe nomi tiajn organizaĵojn en Esperanto, ni unue ekzamenu la vortojn jam registritajn en kelkaj Esperantaj vortaroj.

1. **Presagentejo.** Tiu ĉi termino estas registrita kiel ekvivalento de la hungara **hirügynökség** en la unua eldono de la **Hungara Esperanta Vortaro** (1958) kompilita de Alfonso Pechan. Ĝi aperas ankaŭ en la samaŭtora **Esperanta-Hungara Turista Vortaro** (1968).
2. **informservo.** Hans Wingen en sia **Wörter der Gegenwart — Deutsch-Esperanto)** (1962) tiel tradukas **Nachrichtendienst.** Rimarku, ke en GDR ekzistas entrepreno nomata Allgemeiner Deutscher Nachrichtendienst
3. **novajagentejo.** En la nederlanda-Esperanta vortaro de A. J. Middelkoop (1971) la nederlanda vorto **nieuwsagentschap** havas kiel Esperantan ekvivalenton „novaĵagentejo", kiu estas laŭvorta traduko. La sama Esperanta termino estas registrita apud la sveda **nyhetsbyrå** fare de Ebbe Vilborg en sia **Supplement till Svensk-Esperantisk Ordbok** (1975). Ankaŭ la lastatempe eldonita **Wörterbuch Deutsch-Esperanto** (1983) de Erich-Dieter Krause per „novaĵ-agentejo" tradukas **Nachrichtenagentur.**
   En artikoleto pri ĉinaj gazetoj, aperinta en **Heroldo de Esperanto** (1983, n-ro 1723, pg. 1), estas uzataj la esprimoj „ĵurnalisto de la ĉina novaĵ-agentejo en Budapeŝto" kaj „la sama novaĵ-agentejo (Xinhua)."
4. **inform-agentejo.** Seriozan konsideron meritas la propono de Stefan Maul, profesia ĵurnalisto kaj redaktoro de **Monato.** En **Manlibro pri ĵurnalismo** (1982), kiun li kunaŭtoris kun Judith Junger, la termino „inform-agentejo" estas uzata, kaj sur pĝ. 69 troviĝas la sekva precize formulita difino: „oficejo, kiu helpe de agentoj (korespondantoj) kolektas, prilaboras kaj distribuas (vendas) informojn. Ekzistas ŝtataj (oficialaj) inform-agentejoj, precipe en socialismaj landoj, fakaj (ekonomiaj, kulturaj) kaj privataj inform-agentejoj. Kutime al inform-agentejo estas ligita ankaŭ foto-agentejo. Oni evitu la esprimon „novaĵ"-agentejo, ĉar novaĵo estas io ajn nova produktaĵo".

Mi trovas, ke s-ro Maul tro mallarĝe difinas „novaĵo". Ĝi ja estas io ajn nova, sed PIV difinas ĝin ankaŭ kiel (1) „io ĵus okazinta", (2) „io freŝe sciigita", (3) „io unuafoje aperanta". Mi, do, akceptas „inform-agentejo", sed ne rifuzas „novaĵ-agentejo" kiel alternativan terminon, t. e. kiel sinonimon. Kontraŭe, „pres-agentejo, sen ombro da dubo estas malakceptenda. La misuzo de „pres-" en Esperanto estas rezulto de etnolingva influo.

BERNARD GOLDEN

„LECIONO DE ESPERANTO"

(dokumenta filmo pri la bulgara E-movado)

Laŭ iniciato de Studio por Televidaj Filmoj „Ekran" en Sofio, filma skipo, kreis 25-minutan koloran dokumentan filmon „Leciono de Esperanto". Tio estas la unua bulgara profesia filmo, kies ĉefa temo estas disvastigo de la atingaĵoj de la Internacia Lingvo en Bulgario ekde la unuaj jaroj de la jarcento ĝis hodiaŭ.

La filmo „Leciono de Esperanto" tre lerte konigas al la granda neesperantista publiko interesajn, malmulte konatajn faktojn kaj personojn el la historio de la bulgara E-movado — la unuajn pionirojn Miloslav Bogdanov, Hristo Popov, iliajn lernolibrojn kaj ĉefajn verkojn pri kaj en Esperanto. Sur la ekrano aperas kovriloj de multaj bulgaraj E-eldonaĵoj: libroj, gazetoj, vortaroj, broŝuroj. La filmo kaptas la atenton, disponigante al la spektanto riĉan informon pri la praktika kaj utila apliko de Esperanto en la ĉiutaga vivo kaj en la internaciaj rilatoj, en multaj diversspecaj naciaj kaj internaciaj E-aranĝoj k. a. estas projekciitaj sur kadroj, montrantaj lecionon de Esperanto en unu el la multnombraj kursoj. Sur la ekrano aperas multaj bulgaraj kaj fremdlandaj elstaraj esperantistoj, kiuj parolas pri Esperanto kaj pri sia propra aktivado: veterano Nikola Aleksiev, E-poeto Asen Grigorov, prof. Humphrey Tonkin, d-ro Renato Corsetti k. a. Por montri kaj pruvi la internaciecon de Esperanto la aŭtoroj filmis momentojn el la 68-a UK de Esperanto en Budapeŝto, 1982.

La eĥo de la publiko pri la elsendita filmo estas tre vigla kaj granda. Multaj laŭdaj leteroj estas ricevitaj kaj en Bulgara Televido, kaj en la Centra Oficejo de BEA. Tio ja pruvas la grandan intereson, kiun la filmo vekis kaj kuraĝigas la filmagantojn serĉi novajn temojn pri Esperanto kaj pri la bulgara E-movado.

[Mallongigita, D. SIMEONOV]

Skribis al ni Adolf Schwarz: Mi estis persekutita

Adolf Schwarz estis tre aktiva laborista esperantisto ĝis 1933. En „der esperantist" 125 (3/1984) sur p. 57 ni skribis, ke i. a. ankaŭ Adolf Schwarz elmigris eksterlanden post 1933. Pri tiu temo al ni skribis Adolf Schwarz, kiu nun vivas en FRG:

„En iu numero mi retrovis mian nomon kaj la aserton, ke mi dum faŝisma germana periodo elmigris el mia patrolando. Tio ne ĝustas. Certe mi estis persekutita. Dank' al fervoraj cirkonstancoj, gekamaradoj, solidaraj helpoj kaj parenca ĉia subteno, mi sukcese povis resti en Germanio.

Mi hazarde ĉeestis la polican invadon en la buroo en la Dirksenstrato 42. Pluraj sekretaj policistoj sin jetis sur la sekretarion Ernst Kissler[2]), batis lin terure, postulis konfiski unue la monon de la organizo, certajn materialojn kaj lin minacis per arestado. Dum ĉi konfuza situacio mi sukcesis fuĝi.

Alian tagon mi reaperis en Dirksenstrato 42. Ernst kaj Ria, lia edzino, jus pakis sian havaĵon. Ili decidis reiri al Frankfurt/Main, kie loĝis iliaj gepatroj. Sed — jen estis ankoraŭ la organizaĵaj materialoj, la kasaj raportoj, la listoj de la gvidaj kamaradoj en la distriktoj kaj regionoj, la abonantoj de „Arbeiter-Esperantist", la organo de la laborista esperantistaro, bone ordigita ĉio en specialaj ujoj. Ni bone kaj zorge volvis ĉion en pakpaperon, ŝnurumis ĉion. Estis ampleksaj pakaĵoj, per kiuj mi ŝarĝis miajn ŝultrojn. Tiele mi marŝis al mia kvartala loĝejo kaj tie stokis ĉion. Mi sola tempe uzis la ĉambron, ĉar Respe (August Schwenk) jam estis fuĝinta al Nederlando. La domo estis tipe berlina kun tri malantaŭaj kortoj.

. . . ni venis armarŝe el kortoj sensunaj
el ĉefa proleta kvartal' . . .

tion mi iam skribis. Henriko Bischof komponis la melodion al la kanto.

Unu tagon poste, mi sidis ĝuste sur la interetaĝa necesejo, kiam aro da faŝistoj, SA brue ŝturmis la ŝtuparon, forte frapis la loĝejan pordon. Kion fari? Resti sidante? Ne taŭgos. Do mi supreniris. Ili tuj min demandis pri mia nomo. Senhezite mi diris, ke en la tria korto loĝas samnomulo. Certe la serĉato. Rapidege ili malsuprenkuris. En tiu decida momento mi trankvilege forlasis la domon, atingis la straton, iris al la proksima fervoja stacio kaj veturis al Haselhorst, al la familioj Hans kaj Mila Grützmacher kaj Lotte kaj Erich Post. Ĉie tie estis unu el la kaŝaj centroj de geesperantistoj en Berlin. Tie kunlaboris ankaŭ mia amikino Erna Post kaj Wally, kompartianino. Ŝi nutris nin kun taŭgaj informoj. Nelegalajn gazetojn ŝi lerte tranformis je pintformaj saketoj kaj trompe enmetis ovojn laŭ metodo de merkataj vendistoj. La presitaj legaĵoj estis problemoj, tro ampleksaj kaj tial suspektaj. Tial ni faris de ili fotojn. Fakulo liveris verajn artajojn de ili. Ili estis pli facile kaj kaŝe transporteblaj.

Sed kio okazis en Memeler Strato de post mia foriro? La faŝistoj ekkonintaj la trompajon furiozis. Ili alarmis ĉiujn el siaj aktivuloj kaj la policistaron de la kvartalo, ili baris ĉiujn stratojn el ĝi kaj komencis traserĉi ĉiun domon de kelo ĝis subtegmento. Vane. Mi ja estis for. Sed en mia ĉambro kuŝis la materialaj pakaĵoj, ĉu ankoraŭ, ĉu konfiskitaj? Mi devis tion scii, kontaktigis la tri ulojn kun Alice, la posta edzino de Ludwig Schödl, kaj ŝi, kune kun amikino, iris time aŭ sentime (?egale) en mian ĉambron, prenis la plej gravajn materialojn kaj ilin alportis. Herooj silentas, heroinoj same pri siaj faroj. Tagojn poste mi reiris mian loĝejon por forbruli la endanĝerigan materialon. Kial la polico ne traserĉis kaj konfiskis ĝin? Estis nekredebla, mirinda hazardo. La multa cindro estis embaraso. Kien ŝuti ĝin?

En Haselhorst, en la centrejo, ni ne daŭre povis resti. Fakte, en la pasinto mi preskaŭ regule pasigis sabaton kaj dimanĉon tie. Tial mia restado kaj vizitoj ŝajnis tute regulaj. Dum tiuj tagoj ni aranĝis kunvenojn en la forsto proksime de la lago. Multaj personoj partoprenis. La kaŝa asocia vivo floris, la kontaktoj estis senriproĉaj. En la urbego mem ni naĝis kiel fiŝoj en maro, en la homamasoj. Niaj renkontoj estis aparte tie. Sur la stratoj antaŭ bazaroj kaj magazenegoj, ni okule kontaktis. Fiksaj tempoj, severe garda atento, jen la elementoj laŭ kiuj ni sukcesis eviti ĝenon flanke de faŝisma polico. En certaj bibliotekoj, en muzeoj, en aŭditorioj ni renkontiĝis etope. Ni estis fidinda anaro.

Sed mi devis reiri al distrikto Friedrichshain, havi certan loĝlokon, sen kiu ne eblis ricevo de urba, almoza subteno de 30 markoj monate. Ĉiam post du- tri monatoj mi ŝanĝis mian loĝejon, ĉiam ne tro fore. Tio estus suspekta kaj danĝera. Okazis ofte, ke la polico kaptis proletojn ĝuste tie, kie ili volis akcepti la almozpagon. Tute kiel rabbestoj, kiuj surprizatakas brutaron, ĉe bordo de riveroj aŭ lagoj.

Post la Röhn-puĉo 1934 la situacio pli akriĝis. Urĝis forlasi Berlin, urĝis hejmen iri al mia familio en Virtemberg. Mia familio akceptis min. parenco sukcesis min anonci en la polica registro sen pridemandado. Frato okupigis min en sia eta komerca entrepreno. Jen la kadro, en kiu mi povis daŭrigi la sekretan laboron. Mi kontaktis kun la grupoj en Stuttgart (Nonnemacher), Frankfurt (Kissler), Essen (Schwenk), Münster, Hamburga grupo en Barmbeck, Rostock (kun fianĉino de k-do R. Graetz kaj ties patrino), kun gepatroj de enkarcerigita k-do Ernst Diedrich kaj nature kun Berlin. Kiom ofte mi vizitis la gek-dojn per biciklo! 200 kilometrojn po tage! Mi skribis poemon:

En ĉiu urb', vilaĝo — malgraŭ faŝisma pest'
troviĝas kamaradoj — kaj nelegala rest'.

Kortuŝe la renkonto kun tiu nelegala rest'. Kiam mi vizitis la fratinon kaj patrinon de August Schwenk, ŝi diris al mi sur la sojlo, ĉar persone nekonata: **se** vi estas Schwarz, do eniru! Kaj ŝi oferdonis al mi teleron da sia avenosupo!

En Münsterland ni havis sekretan kunvenon sub ĉielo, partoprenanto demandis sian apudsidanton. Kiel ekkoni Schwarz? Ties respondo: Kiam mi vidas lin, tiam vi scias, estas li, estas la ĝusta. Strange, sincera homo radiumas konfidon; li estas forta, ĉar li fidas al si mem, la vero estas unu el liaj sanaj radikoj.

Ĉe la enterigo de Ernst Kissler mi parolis ĉe lia tombo, honore, kvankam en la lingvaĵo de sklavoj, kiel Lenin foje diris. La ĉeestantaj policoj nek malhelpis nek arestis min. Kamarado Ernst mortis post grava operacio en urba malsanulejo.

Sklava lingvo, kio estas tio? Ekzemplo: August Schwenk skribis foje, supozante, ke la faŝistoj murdis Ernst Kissler, al Alfred Glasemann en Berlin: Die Zeitungen hier schreiben viel mal Gutes über Deutschland. La vorto ‚operacio' signifis en sklava lingvo: fitraktado ĝis morto.

Tiom pri la suspekto de mia elmigrado. Certe mi konsideris ankaŭ tiun eblecon, ĉefe dum la civitana milito en Hispanio. Iun tagon, dumvoje per biciklo mi partoprenis nevole neordinaran travivaĵon. Estis ĉe marbordo en haveno. Apela kunveno de la tuta militŝipa viraro. La militmarista ŝipestro demandis sugestive: Kiu volas **libervole** partopreni en la milito hispana je la flanko de generalo Franco?

Kelkaj senhezite sin anoncis.

Por mi ne plu estis problemo. Mi memoris pri vortoj de d-ro Zamenhof: ni juras batali . . .

Do, nia batalo estas por libereco, por la laborista klaso. Tia batalo en kondiĉo de faŝisma subpremo kaj ekstermo estas terure viktimplena, kreas vundojn ankaŭ nevideblajn. Sub tiaj mi suferas ankoraŭ hodiaŭ. En la jaroj tridekaj mi streĉe ekzercadis la **forgesadon**, la forgesadon de nomoj! Nerevekeble forgesi. Mi sukcesis je tiu malhumana traktado, esperante, ke eĉ torturoj maltaŭgus perfidi kamaradojn.

Por iuj elmigrado certe estis la sola, simpla vojo savi la propran vivon aŭ konservi sian forton por daŭrigi la laboron kaj la batalon. Tion mi faris en la hejma lando, en la faŝisma periodo ankaŭ."

Adolf Schwarz

Portu ĉiam la insignon!

Dum nia dusemajna vojaĝo 1985 al kaj en Bulgario okazis sekvaj hazardaj renkontoj kun esperantistoj: Dum mia trajnveturo al Rumanio, konversaciante germanlingve kun rumanino, evidentiĝis, ke la knabino parolis kelkajn vortojn Esperante. Ŝi lernas la lingvon aŭtodidakte kun 30 persona grupo en rumana urbo.

En la Bukureŝta ĉefstacidomo mian insignon ekvidis 2 polinoj partoprenintaj labortendaron en Bulgario.

Alveninte ĉe grava relvoja nodo en Gorna Orjahovica, en stacidoma vitrino sin anoncis per adreso kaj telefon-numero 5 fervojistoj. Dum ekskurso en Gabrovo ekkonis mian insignon Gabrovano, ofertante sian helpon pri la sekva buslinio.

En la Gabrovo en la etnografia kaj arktiktura muzeo Eter mi rimarkis ŝildon „Per Esperanto al amikeco interpopola" kaj poste konversaciante kaftrinkis.

Dum ekskurso en Smoljan mi demandis bulgaron pri la vojo bulgarlingve, tiu respondis en rapida Esperanto.

La instruo por mi estas, ke eksterlande mi ĉiam portu Esperanto-insignon, nek grandan nek tro malgrandan.

B. Schumann

Laborbrigado en Bulgario

En Guljanci ĉe Pleven dum aŭgusto 1985 okazis brigado enkadre de la bulgara junulara movado. Gejunuloj el 9 landoj helpis en la agrikultura laboro.
Ni ĉiam denove estis kortuŝitaj de la bulgara gastamo. Jam la festo de solena malfermo estis granda travivaĵo. Akceptitaj per pano kaj salo la gastoj pasie dancis kune kun la gastigantoj popoldancojn. Malgraŭ la lingvaj problemoj ni ofte kontaktiĝis kun enloĝantoj. La laboro daŭris 6 horojn potage, nur dimanĉe estis libera tago. Baldaŭ ni alkutimiĝis al la varma suda klimato. La objektoj de nia laboro ŝanĝiĝis kelkfoje, inter alie ni rikoltis diversajn specojn de tomatoj, paprikoj kaj terpomoj. La fina pagado de proksimume 50 levoj okazis relative sendepende de la unuopa laborkvanto, sed estis premiitaj la plej laboremaj brigadanoj per esperantaĵoj (inter ili ĉiuj 7 gegermanoj).
Bedaŭrinde la ĉirkaŭaĵo de la barakaro ne invitis al ekskursoj, restis la ebleco busveturi unu horon al Pleven aŭ babili en la barakaro. Granda manko, kiu malplibonigis la efikon de tiu aranĝo, estis la malalta lingva nivelo de la plimulto de la partoprenantaro, ĉefe de la bulgaroj (!), poloj kaj jugoslavoj. Eĉ inter la organizantoj estis „eternaj komencantoj". La lingva bariero malebligis organizi pliajn libertempajn aranĝojn krom ĉiuvesperajn diskotekojn kaj kvin naciajn vesperojn (jugoslava, germana, pola, rumana, bulgara).
Unu komunan ekskurson ni entreprenis al la nacia memorejo „Panoramo" en Pleven, dedicitan al la liberiga batalo kontraŭ la turka jugo en 1876/77. La gvidado de la E-brigadanoj okazis per rusa lingvo kun konciza E-traduko.
La organizantoj komence provis doni bazajn lingvokonojn per kursoj, sed tio malsukcesis pro la vasta manko je volo lerni kaj paroli E-n. Ĉefe oni interkompreniĝis per bulgara kaj rusa lingvoj. Tamen ankaŭ kelkaj komencantoj klopodis uzi kaj plivastigi siajn lingvokonojn.
Ni ĝojus, se estontaj organizantoj de E-laborbrigado ne nur bone prizorgus la laboron sed ankaŭ la libertempan flankon, precipe la lingvouzon.

Stefan Bode
Bernd Kuse

Laste aperis

(Bibliografio! Ne librooferto!)

— Bulgaraj kuracakvoj kaj banlokoj, D. Kostadinov. El la bulgara trad. St. Moraresku. Sofio: Medicina Sekcio de Bulgara Esperantista Asocio, 1983. 39 p. Ilus. Mapo. Mimeo. 20 cm.

— Bulgara revolucia Esperanto-gazetaro dum la periodo 1929. — 1934, La, M. T. Jankova-Bojaĝieva. El la bulgara trad. Lidia Raeva. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1983 .78 p. 22 cm.

— Curs elementar de esperanto, Ignat Florian Bociot (1924) kaj Mioara Lacrima Dobre. Timisoara: Universitatea din Timisoara, 1983. 21 cm. 1-a eld. 131 p. 13-leciona lernolibro kun legaĵoj kaj konversacia frazaro. 2a eld. 236 p. La sama lernolibro kun 105-paĝa Esperanta-rumana-Esperanta vortaro.

— Dancistino, La (1980)/Kiel rosperloj sur folio (1905), Oogai (pseúd. de Rintaro Mori, 1862 — 1922) kaj Sooseki (pseúd. de Kinnosuke Natume, 1867 — 1916). El la japana trad. Šiger Ujeki. Tokio: Zamenhof-Klubo, 1984. 95 p. 19 cm. Du fruaj noveloj de du famaj japanaj verkistoj.

— El la maniko (1955), Reto Rossetti (1909). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984 (reireso). 221 p. Ilus. 21 cm. Jubilea Eldonserio: 1 Beletro originala 5. Originala novelaro, kiu prezentas skizojn en riĉe esprimpova familiara stilo.

— Esperanto: un droit à la communication, L'. Div. aútoroj. Paris: Union Française pour l'Espéranto, 1983. 15 p. Ilus. 30 cm. Profesinivele produktita informilo.

— Hungaraj fabeloj, Elek Benedek (1859 — 1929). El la hungara trad. Mária Benczik. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1983 (2a eld.). 70 p. Ilus. de Ida Csáky. 20 cm. ISBN 963571 118 2. Dek rakontoj de „hungara Andersen".

— Jaĥto veturas for . . . kaj veturigas la morton. Deck Dorval (pseúd.). Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1983. 190 - Ilus. 21 cm. Originala krimromano kun belga fono.

— Kiuj semas plorante . . ., Éva Tófalvi (1947) kaj Oldřich Knichal (1939). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 107 p. 21 cm. ISBN 92 9017 029 8. Psikologia, intima romano, kvazaú taglibro de la protagonisto, kiu erarvagas sub influo de faŝisma ideologio, kun biografioj pri la aŭtoroj; gajnis Premion Raymond Schwartz en 1980.

— Konservi la pacon por la nunaj kaj estontaj generacioj, J. V. Andropov. El la rusa trad. V. Arolovič. Moskvo: APN, 1983. 30 p. 20 cm. Deklaroj kaj intervjuoj.

— Konstrui fajron, Jack London (1876 — 1916). El la angla trad. D. C. Laroque Timbaut: Laŭte, 1984, 27 p. Ilus. Mimeo. 21 cm. SAT-Broŝurservo. Rakonto de konata usona verkisto pri la orserĉista epoko en Jukono.

— 40 vidindaj lokoj en Ĉinio. El la angla trad. Censinio. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 251 + 19 p. Kolorilus. Mapo. 19 cm. Feniksa Libraro. 12-Es-1825P. Ampleksaj turismaj kaj historiaj priskriboj de la plej vizitindaj lokoj en Ĉinio, kun desegnaĵoj kaj 16 paĝoj da koloraj fotoj.

— Libroservo de UEA: Katalogo 1984/85. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 352 p. Ilus. 16 cm. Katalogo de plimalpli ĉio disponebla en la merkato de la Esperantaj libro, periodajo, disko ks. Senpaga por la membroj kaj klientoj de la Libroservo de UEA.

— Metodiĉesko rakovodstvo za učitelite po esperanto, Marin Bazev kaj Mihail Elenov. Sofija: Ministerstvo na Narodnata Prosveta, 1983. 154 p. Mimeo. 20 cm. Oficiala metodika gvidilo por libervola instruado de Esperanto en Bulgario.

— Paŭlo kaj Liza, Reto Rossetti (1909). Britio: la aŭtoro, 1983 (2a eld.). 11p. Ilus. Mimeo. 21 cm. Bilda legolibreto por komencantoj, kiu instruas bazan gramatikon.

— Programad-lingvo Basic, La, Christian Bertin (1949). Cesson-Sevigne: la aŭtoro, 1984. 152 p. Tabeloj. Mimeo. 30 cm. Ampleksa enkonduko en la komputilan instrukci-kodon „Basic", kun glosaro kaj indekso.

— Propedeutische waarde van de internationale taal Esperanto, De, Helmar Frank, El Esperanto trad. Paul Kempeneers. Antwerpen: Vlaamse Esperanto-bond, 1984. 16 p. 21 cm. Pri la propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo.

— Retoromanĉa, La; Sorto de la plej malgranda nacia lingvo de Svislando, Arthur Baur. Bellinzona: „Hans Dubois", 1984. 59 p. Mapo. 30 cm. Detala verko pri la historio, evoluo, literaturo kaj socia pozicio de la romanĉa lingvo.

— Ribela kordo. Hristo Gorov (1908). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1983. 71 p. 20 cm. ISBN 963 571 113 2. Originala poemaro de elstara bulgara esperantisto.

— Rodopa falko, La, Jantaj Kavalov. El la bulgara trad. Ivan Kovaĉev. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1984. 47 p. Ilus. 20 cm. Rakonto pri la vivo de Diĉo Petrov (1919 — 1944).

— Romantika periodo, La; Tra la parko de la franca poezio. El la franca trad. Gaston Waringhien (1901). Ascoli Piceno: Eldono Gabrielli, 1982. 322 p. 20 cm. Beletra Eldonserio, n-ro 17. Dulingva: Esperanta-

franca. Originaloj kun tradukoj el la franca poezio de 1790 ĝis 1902, kun notoj kaj enkondukoj pri ĉiu skolo, verkitaj de la tradukinto.

— Septembra ribelo 1923 — heroa batalo de la bulgara popolo kontraŭ la faŝismo, red. D. Papazov. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1983. 134 p. Mimeo. 20 cm. Referaĵoj, prezentitaj dum konferenco.

— Sociopolitieke, pedagogische en kulturele waarde van het Esperanto, De, Edward Symoens (1915). Antwerpen: Vlaamse Esperantobond, 1984. 48 p. 21 cm. Nederlandlingva broŝuro pri la socipolitika, eduka kaj kultura valoro de Esperanto.

— Tiel diru!; 5 000 expressions, L. Lentaigne. Laroque Timbaut: Laŭte!, 1984. 127 p. Mimeo. 21 cm. SAT-Broŝurservo. Kvin mil vortoj kaj esprimoj, alfabete ordigitaj laŭ la franca.

— Wörterbuch Deutsch-Esperanto (1954), Hans Wingen. Hildesheim: Georg Olms Verlag, 1984 (2a represo). 178 p. 17 cm. Konata germana-Esperanta vortaro kun multaj kunmetaĵoj kaj idiotismo; kun aldonita bibliografieto.

— Wörterbuch Esperanto-Deutsch (1952), Max Butin kaj Josef Sommer. Hildesheim: Georg Olms Verlag, 1984 (2a represo). 248 p. 17 cm. Konata Esperanto-germana vortaro.

— Ĉu vi konas la teron?; Ĉapitroj el la geologiaj sciencoj, Endre Dudich. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro de UEA, 1983. 150 p. (+ 68 p. da anoncoj). Ilus. 23 cm. ISBN 963 571 080 1. Altnivela enkonduko en la geologion, kiu kun abundaj figuroj kaj tabeloj traktas geonomion, geokemion, mineralogion, dinamikan geologion, petrologion kaj sedimentologion, paleontologion, tektonikon, ter-internon, terhistorion kaj stratigrafion, aplikajn geofizikon kaj geologion, kosmogeologion kaj planedologion, kun terminaro kaj bibliografio.

— D-ro Zamenhof, Esperanto kaj la Esperanto-movado, Adriana J. Middelkoop (1913). Hago: Esperanto-Centrum Nederland, 1984 (3a eld.). 16 p. Mimeo. 21 cm. Konciza faktaro por la nederlanda elementa ekzameno pri Esperanto.

— Esperanto aŭtodidakte; Internacia lernolibro de la Internacia Lingvo (1983), Audrey Childs-Mee (1926). Antverpeno-La Laguna: TK/Stafeto, 1983 (2a eld. reviziita). 194 + 40 p. Ilus. de S. Marković. 21 cm. ISBN 90 6336 0290. Rektmetoda lerno-libro verkita precipe por la bezonoj de aŭtodidaktaj lernantoj, sed taŭga ankaŭ por kursoj. Kun ŝlosilo por la ekzercoj kaj kun indeksoj.

— Esperanto, une approche de la langue internationale (1979). Paris: Union Française pour l' Espéranto, 1984 (2a eld.). 60 p. Ilus. 15 cm. Konciza gramatiko, dudirekta vortareto, adresaro kaj aktualaj informoj, kun librolisto.

— Knabino Ginsengo, komp. Jiang Cheng' an kaj Wu Daisheng. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983, 38 p. Kolorilus. de la aŭtoroj. 19 cm. 88-Es-177P. Porinfana fabelo pri la origino de la drogherbo Ginsengo.

— Kvarteto de Mendelssohn kaj aliaj rakontoj, La, Jarosław Waszkiewcz. El la pola: Jerzy Grum Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1982. 103 p. Ilus. 21 cm. ISBN 83 7013 006 2. Ok elektitaj rakontoj de konata pola verkisto.

— Language and Language Learning; Report of a Conference. New York: Center for Research and Documentation/Esperantic Studies Foundation, 1983. 95 p. 29 cm. Anglalingva raporto de konferenco pri la lingvo lingvolernado, aranĝita i. a. de CED (Novjorko, 15 dec. 1982); 7 prelegoj kaj paroloj de gravaj edukistoj, Humphrey Tonkin, Bruce Arne Sherwood.

— Esperanto kiel interlingvo en maŝina tradukado (1985), de Rüdiger Eichholz (1922). Bailieboro: Terminologia Centro de ISAE, 1985. 24 p. Mimeo. 29 cm. Represaĵo de komentoj pri la perkomputila tradukprojekto Distribuita Lingvotradukado (el Akademiaj studoj 1985).

— Esperanto-kurso por memlernado; Unua volumo, Li Shijun. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 330 p. 330 p. Ilus. 19 cm. Dekok-leciona lernolibro por ĉinlingvaj komencantoj, kun ampleksaj tekstoj, interparoloj, tradukoj, gramatikaj klariĝoj, ekzercoj kaj gramatika kaj ekzercosolva apendicoj plus 42-paĝa Esperanta-ĉina vortaro.

— Iu instruisto — Celestin Freinet (1979). El la franca trad. Esperanto-Komisiono de ICEM. Valence-sur-Baise: ICEM-Esperanto, 1984. 24 p. Ilus. 21 cm. Fote ilustrita informilo pri la vivo kaj pedagogiaj metodoj de Celestin Freinet (1896 — 1966).

— Kaverno apud la maro, Bertram Potts (1895). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1985. 228 p. 22 cm. ISBN 90 6336 025 8. Dek unu noveloj originale verkitaj en Esperanto, de aŭtoro ŝatata pro sia novelarto kaj poezio.

— Kiel administri, librotenadi? Parizo: Unuiĝo Franca por Esperanto, 1985 (ne indikita). 48 p. Mimeo. 30 cm. Konsiloj pri administrado kaj kontado por lokaj federacioj de Esperanto-grupoj.

— Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko 1 kaj 2. Poprad: Slovakia Esperanto-Asocio, 1983/4. 59 + 79 p. Mimeo. 20 cm. Dek du prelegoj (i. a. pri la genro, fonologio, terminologio, tipologio, tradukado, instruado) el la lingvistikaj seminarioj en Nitra (1982/3).

— Li kaj ni; Festlibro por la 80a naskiĝtago de Gaston Waringhien, red. Reinhard Haupenthal (1945). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1985. 520 p. Ilus. 22 cm. ISBN 90 6336 034 7. Pompa volumo, al kiu kontribuis 49 konataj eminentuloj sur diversaj kampoj i. a. per originalaj literaturkritikaj,

esperantologiaj kaj interlingvistikaj artikoloj; kun biografio pri Waringhien kaj la kontribuintoj kaj biliografio de la verkaro de Waringhien (plus faksimiloj de korespondaĵoj de Zamenhof).

— Nomaro de britaj birdoj/British Bird Names, Komp. Edward Ockey (1913). Banstead: Mondlingvaj libroj, 1985. 15 p. Mimeo. 21 cm. Alfabete ordigita laŭ la anglaj nomoj kun ekvivalentoj en Esperanto, la latina, franca kaj germana; kun bibliografio.

— Sveda novelaro (1950), div. aŭtoroj. El la sveda trad. Ferenc Szilágyi (1895 — 1967). Stokholmo: Sveda Laborista Esperanto-Asocio, 1985 (2a eld.). 235 p. 20 cm. Represo de antologio de 20 socitemaj noveloj el la 30-aj kaj 40-aj jaroj de pluraj konataj svedaj verkistoj.

— Unua Volapük-kongreso: Friedrichshafen, Aŭgusto 1884, La; Dokumentoj kaj komentoj/ Der erste Volapük-Kongreß: Friedrichshafen, August 1884, Dokumente und Kommentare, komp. R. Haupenthal. El la germana trad. la kompilinto. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984. 119 p. Ilus. 21 cm. Jubilea Eldonserio: 4 Interlingvistiko 3a Dulingva: germana-Esperanta. Represo de dokumentoj kun biografiaj notoj kaj bibliografic; kun aparta germanlingva protokolo de Jakob Ils.

— Vizito de prezidento, Jerzy Zawieyski (1902 — 1969). El la pola trad. Andrzej Pettyn (1937). Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1984. 36 p. 21 cm. ISBN 83 7013 001 1. Psikologia portreto de sesjara filo de disiĝinta paro, kiu iĝis filmo sub la reĝisorado de Jan Batory.

— Leksikon društveno-političke i samoupravne terminologije srpskohrvatski-esperanto/Leksikono de socipolitika kaj memadministra serbokroata-Esperanta, komp. Novak Strugar. El la serbokroata trad. A. Sekelj. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1983, 49 p. 20 cm.

— Psikologio kaj metodiko de Esperanto-instruado, Boris V. Tokarev (1927). Soveta Unio: sen bibliografiaj detaloj, 1984. 48 p. Mimeo. 20 cm. Gvidilo por Esperanto-instruistoj, kun prezento kaj kritiko de multaj instrumetodoj.

— Salale!, Farok Topan kaj Ebrahim Husein. El la svahila trad. Nino Vessella. Pisa: Edistudio, 1984. 175 p. 21 cm. ISBN 88 7036 021 0. Du modernaj, socie engaĝitaj tanjaniaj teatraĵoj, Custuminto paradizon kaj Diabloj, kun orientafrika islama kultura fono. La unua afrika traduko en la Internacia Lingvo.

— Vivo de d-ro L. L. Zamenhof en bildoj, La, Henk Thien (1911). Nederlando: la aŭtoro, 1984 (ne indikite). 128 p. Ilus. Mapoj. 30 cm. Dokumenta bildlibro, kompilita de la fondinto kaj prizorganto de la Foto-Servo pri Zamenhof; 114 fotoj kaj 25 mapoj sur luksa papero.

El Japanio al Stralsund

Estas konate, ke la japana Esperanto-pacmovado estas tre aktiva kaj povas retrorigardi al tre ampleksa agado. Okaze de la 40a datreveno de la sensrespondeca atombombado sur la urbojn Hiroŝima kaj Nagasaki fare de la usona armeo en aŭgusto 1945 ni transsendis salutmesaĝon al la japanaj pacamikoj. Ni esprimis al ili dankon kaj agnoskon pro ilia sinofera paclaboro kaj raportis samtempe ankaŭ pri la sincera pacpreteco de nia registaro kaj de ĉiuj civitanoj en GDR. Kune kun la salutmesaĝo ni ankaŭ transsendis tri infandesegnaĵojn de nia Esperanto-infangrupo pri la temo „atoma milito" kaj aliajn skribaĵojn pri nia paca agado. El Tokio ni ricevis dankleteron kun jena laŭvorta teksto:

„Estimataj, kun granda ĝojo ni ricevis viajn leterojn kaj materialojn por paco, okaze de la 40a datreveno de atombombiĝo en Hiroŝima kaj Nagasaki. En la kadro de Japana Kongreso de Esperantistoj, kiu okazos en urbo Jokohama aŭguste ni havos porpacajn kunsidojn kaj ekspozicion, kie ni prezentos vian mesaĝon kaj tri infanajn bildojn ege ĉarmajn. Bv. ricevi nian plej novan libron, reviziitan „Nudpieda Gen" kaj ankaŭ elkoran dankon al via klopodo por konservi pacon.

En la nomoj de Esperantista Societo por Hiroŝimo-Nagasaki kaj „Rondo Gen"

Syozi Keiko

Rimarko: La libro „Nudpieda Gen" estas porinfana bildromano, kiu rakontas la historion pri la familio Nakaoka en urbo Hiroŝima. Ĝi estas kvazaŭ aŭtobiografio — la aŭtoro, s-ro Nakazawa Keizi, mem perdis sian patron kaj gefratojn en la hiroŝima inferno.

Esperanto-grupo Stralsund

ITREE 1985

La Oka Internacia Renkontiĝo en Ercmontaro okazis en Bohemia Ercmontaro en Junio 1985. La partoprenantoj venis el ĉeha kaj slovaka Esperanto-Asocioj, el Bulgario, Hungario kaj GDR. La plejmulto de la partoprenantoj venis el GDR. Ni loĝis en turismaj kabanoj sur monto, en la bela ĉirkaŭo de Karlovy Vary (naturprotekta teritorio). Atendis nin interesa turisma programo, zorgeme preparita. Dum migradoj kaj promenadoj pri konatiĝis kun antikvaj urbetoj kaj kasteloj, sekvis la spurojn de Goethe kaj Beethoven kaj konatiĝis kun la kuracmetropolo Karlovy Vary. Speciale impresigaj en Karlovy Vary estas la termofonta naĝejo sur monto, la malnova luksa kuracdomo de l'komenco de nia jarcento kaj la gotika kapelo, nun uzata kiel kafejo. Kvankam la vetero ne estis tre bona (la ĉijare tre longdaŭra „ŝaffrido"), tamen estis tre sukcesa aranĝo, dank' al la klopodoj de la esperantistoj de Karlovy Vary. Specialan dankon meritas tiurilate Jaroslav Klement kaj lia edzino, subtenitaj de Rudolf Eichler.

Rudolf Hahlbohm

Recenzoj

W. Gruhn: Sprachen lernen (k)ein Problem? Urania-Verlag Leipzig-Jena-Berlin 1984, 181 p.

Tre lerte kaj kun multaj faktoj la aŭtoro traktas la diversajn problemojn ligitajn al la fenomeno lingvo kaj ties lernado. La libro havas popularsciencan karakteron kaj reflektas ĉefajn poziciojn de la aktuala lingvoscienco kaj lingvodidaktiko de GDR. La libro estas dividita en 6 ĉapitrojn. En la unua ĉapitro la aŭtoro traktas i. a. la demandon, kiom da lingvoj ekzistas, kio estas lingvo, la ekestiĝon de lingvoj. La dua ĉapitro skizas la ĉefajn karakterizaĵojn de la lingvoj sur la tero, montras evolutendencojn de la internacia lingva komunikado kaj entenas tre bonan kaj relative ampleksan ĉapitron pri planlingvoj (vidu sube). La 3a ĉapitro temas pri la gepatra lingvo kaj pri la multlingveco de lingvogeniuloj traktas ĉapitro 4. Sekvas ampleksa 5a ĉapitro, en kiu la aŭtoro priskribas fiziologiajn, psikologiajn kaj aliajn kondiĉojn de la alproprigo de fremdlingvoj. La libron finas ĉapitreto pri profesioj lingvorilataj (tradukistoj). Ĉiu lingve interesita — kaj esperantistoj ĝenerale estas lingve interesitaj, trovos multe da interesaj informoj kaj vidpunktoj en la volumo. Aparte notinda estas la fakto, ke la ĉapitro „planlingvoj — provo solvi la mondan komunikadan problemon" (p. 31 — 37) ĝenerale estas tute objektiva kaj bona. Gruhn unue konstatas, ke la ideo pri kreo de internacia lingvo ne estas nova, sed ke aparte lastatempe kreskas la bezono venki la kreskantan lingvan barieron. El la diversaj projektoj de planlingvoj (li uzas tiun terminon preskaŭ korekte) li citas Volapük, Novial, Occidental, Universal, Interlingua kaj Basic English kaj Ido. Aparte li traktas Esperanton substrekante, ke „hodiaŭ ni povas konstati, ke ĝis hodiaŭ nur Esperanto ankoraŭ estas uzata kiel lingvo. Ĉiuj aliaj provoj internacie sukcesigi planlingvojn oni devas — retrorigardinte — juĝi fiaskintaj" (p. 33). El la kaŭzoj por la sukceso de Esperanto la aŭtoro mencias la internacian leksikon, la facile lerneblan gramatikon, la prononcfacilecon. Sekvas ĝenerale ĝustaj informoj pri la publikigo de la unua libro, la disvastigiteco de Esperanto, informoj pri la leksiko kaj ties evoluo (PIV kun 15 300 radikoj). Oni plue trovas informojn pri Esperanto kiel lingvo de beletro kaj scienca literaturo, pri la internaciaj kaj naciaj Esperanto-organizajoj kunlaborantaj kun UNESKO.

Tre grava estas la konstato: „La nuntempa esperantisto nepre ne devas esti miksita kun la burĝaj kosmopolitoj, kiuj foje sektece kultivis sian „mondlingvon". La internacia Esperanto-movado de la nuntempo siavoje kontribuas al la komunikado inter la popoloj kaj tiel por la malstreĉiĝo kaj por la plifirmigo de la monda paco" (p. 36). Prave substrekante, ke Esperanto ne volas anstataŭigi la lernadon de fremdaj lingvoj, la aŭtoro atentigas pri la propedeútika valoro de la planlingvo. Li plue mencias la valoron de Esperanto por la lingvosciencisto kaj por informadisto.

La ĉapitro finiĝas per jena konstato:
„Se ja temas ĉe Esperanto pri lingvo ne kreskinta nature kaj ne havanta, por tiel diri, kulturhistorian teritorion, tamen hodiaŭ apenaŭ eblas serioze pridubi ĝiajn ecojn kiel utiligebla komunikilo, ĉar disaŭdigas 17 radiostacioj el 14 landoj en tiu ĉi lingvo, aperas cent esperantlingvaj revuoj, ekzistas pli ol 130 fakvortaroj kaj okazas ĉiujare internaciaj kongresoj, en kiuj oni vere ne bezonas tradukistojn.

Jam hodiaú prezentiĝas la datumprilaborado kiel aplikajo por Esperanto aŭ la maŝina tradukado. Ekzemple eblas ellabori programadajn lingvojn surbaze de Esperanto. Kaj ĉe la aŭtomata tradukado ĝi povas servi kiel pontolingvo inter ajna fontolingvo kaj unu (aŭ pluraj) cellingvoj. Kiel oni entute prijuĝu la perspektivojn de la internacia lingva komunikado? Nuntempe nur malfacile eblas prognozi. Marksistoj jam ĉiam traktis la lingvan problemon en intima ligo al socia evoluo. Laŭ la opinio de la sovetia interlingvisto kaj prezidanto de Asocio de Sovetuniaj Esperantistoj, M. Isaev, la „dulingveco de la sovetiaj popoloj tute respondas al la leĝeco de la evoluo de la naciaj rilatoj en la socialisma socio". Laŭ lia opinio sur internacia nivelo — apud pluevoluado de la naciaj lingvo — ankaú perfektiĝos la internacie uzataj planlingvoj. Per tio emfaze estas substrekata la signifo de komunikilo kiel Esperanto por la estonteco". (p. 36/37)

Jam el la prezentita superrigardo kaj la cititaj tekstoj klare evidentiĝos, ke la aŭtoro verkis serioze, studinte taúgajn materialojn. En la cititaj fontoj oni trovas tre bonan artikolon de prof. Frank Häusler („Mondlingvoj, planlingvoj kaj internacia komunikado" en Wissenschaftliche Zeitschrift der Pädagogischen Hochschule „Erich Weinert", Magdeburg, 2/1981) kaj la antologion „Problemy interlingvistiki" de M. I. Isaev.

Kritike rimarkigi oni devas jenon:

1. Ne nur simple „kelkaj centoj" (p. 32) da projektoj de planlingvoj ekzistas ekde la mezepoko, sed, kiel montris A. Duličenko, preskaŭ 1 000.
2. W. Gruhn skribas, ke lingvistoj nomas ‚planlingvo' lingvon de la homo konscie kaj laŭplane kreitan, kiu devas servi al la interhoma komunikado. Kvankam tre laŭdindas la utiligo de la termino „planlingvo" (p. 32), oni devas aldoni, ke temas pri lingvo **destinita por internacia komunikado**.
3. Volapük ne estis evoluigita 1789 sed 1889 (p. 32). Verŝajne temas pri preseraro.
4. Atentigante pri la aparte eŭropa karaktero de la leksiko de Esperanto (p. 34), la aŭtoro opinias, ke por neeŭropanoj la lernado de Esperanto certagrade estas malavantaĝigitaj. Tio esence estas prava. Sed mankas indiko pri la neeŭropa strukturo de Esperanto.
5. Kiel ekzemplon por leksikaj duoblaĵoj la aŭtoro mencias komputilo, komputero kaj komputjero kaj indikas, ke venkis komputoro (p. 35). Anstataŭ komputjero devas esti kompjutro. Kaj ne venkis komputoro sed, ŝajne, pli kaj pli uzatas komputilo.

6. La aŭtoro mencias, ke ekzistas pli ol 130 „ampleksaj" fakvortaroj (p. 37). Mi ne scias, kie li legis pri tiom da ampleksaj, sed certe jam ekzistas multe pli ol 200 vortaroj, sed ĉefe neampleksaj.
7. Tre bedaŭrinda manko estas la absoluta nemencio de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR. Ankaŭ en la ĉapitro „formoj de la fremdlingvo-instruado en GDR" (p. 65 — 77) mankas iu ajn indiko pri lernebleco j de Esperanto.

La menciitaj kritikaĵoj facile estas forigeblaj en dua eldono.

Detlev Blanke

Károly Aszlányi; Sep Vangofrapoj, eld. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1984, dua eldono; unua eldono ĉe The Esperanto Publishing Co., 1943; trad. el la hungara: László Somlai (Spierer); 148 p.

Ekzistas multaj romanoj pri venĝo, kelkaj el ili eĉ atingis mondfamon. K. Aszlányi, laŭ antaŭparolo de V. Benczik, ne apartenis al la elito de la hungaraj verkistoj de sia epoko, kvankam li tute ne sentalente aŭ malsukcese skribis siajn satirajn verkojn.
Satiro ne estas simple humuro. Ĝi atakas, ridindigas, havas estetikan aŭ socialan celon, kaj ofte en ĝi ne mankas pli malpli profundaj filozofiaj pensoj.
Tiaj estas ankaŭ la „Sep Vangofrapoj", kiujn ricevas brita ŝtalreĝo komence de la tridekaj jaroj pro tio ke li senlaborigis kaj per orgojlaj vortoj ofendis inĝenieron William Tenson MacPhab. Komencante publikan vangofrapan kampanjon kontraŭ sia eksĉefo, MacPhab punas, rindindigas la ŝtalreĝon antaŭ la okuloj de tuta Britio: Li unufoje potage, dum unu semajno, vangofrapas lin en ĉeesto de almenaŭ unu lia persono kaj ĉiam precize kaj senprokraste raportas pri la evento al gazetaro. La sepa vangofrapo estas, kvankam nur simbola, kulmino de la venĝo kaj de la libro. La kolerega ŝtalmagnato kvazaŭ freneziĝas.
La libro estas flue legebla, klare tradukita, plena je surprizoj kaj detaloj pri la arto vangofrapi sen esti malhelpata aŭ punata. Tamen ĝuste tiu lasta fakto iom malkontentigas la leganton, almenaŭ je la fino de la romano: Kio okazos post tiu semajno? Aszlányi finverkis sian kvazaŭfabelan historion pri la sep vangofrapoj, sen trovi solvojn por la tuŝitaj de li sociaj malfacilaĵoj de sia heroo: la senlaboreco, la serioziĝanta konflikto kun grandburĝa reprezentanto de la kapitalisma ordo kaj konsekvence la konstanta fuĝo antaŭ la polico.
Sed ne tio estis la temo de Aszlányi. Li prezentis intereskaptan, amuzigan aventurromanon pri neordinara venĝo, fojfoje meditante pri la socia stato de Britio kiel fono de la priskribitaj eventoj, kaj ĉiam lerte fidinte al la indigno de multaj senlaboruloj de sia tempo.

Ulrich Becker

Luksa faldprospekto „Kio estas USSR?"

La eldonejo de la gazetara agentejo Novosti (APN) en Moskvo dum la lasta tempo eldonis diversajn gravajn broŝurojn pri la aktuala internacia politika situacio el la vidpunkto de Soveta Unio kaj fine de 1984 aperis 16-paĝa (A5-formata) kolora prospekto, kiu estas disfaldebla al A2-formata informa folio. Ĝi entenas multajn bazajn informojn pri la 15-respublika unio de ŝtatoj. Elstare belaj estas kolorfotoj pri pejzaĝoj kaj urboj kaj la folkloraj kostumoj de la sovetiaj respublikoj. La faldprospekto estas vere altnivela, informriĉa kaj tipografie senriproĉca eldonaĵo. Mendu ĝin grandkvante ĉe: Novosti/APN USSR—107082—Moskvo, Bolŝaja Počtovaja 7, Soveta Unio.

**Ukrainaj Popolaj Fabeloj.
Kompilita kaj tradukita de Nadija Hordijenko-Andrianova,
redaktita de Lidia Raeva,
eldonita de BEA, 1983, 80 p.**

Fabeloj, iam buŝe heredigitaj de generacio al generacio, poste kolektitaj kaj libre eldonitaj, apartenas al la popoloj kiel la historio mem. Sen tiu formo, ordigi, klarigi kaj foj-foje eĉ eskapi la realecon, la vivo de la plejmulto el niaj antaŭuloj estintus neeltenebla.

Kvankam la nuntempulo en niaj regionoj ne konas la materialan mizeron kaj nutras sian spiritan bezonon en lernejoj kaj librejoj, per radio kaj televidilo, li tamen serĉas iam kaj tiam pli profundan kaj same pli simplan regularon de la homa ekzistado. En fabeloj venkas la bono kaj malvenkas la malbono, gajnas la lertulo kaj malgajnas la mallertulo, la diligenta, honesta homo ricevas sian rekompencon, la maldiligenta, malhonesta sian punon — kiel devus esti en tiu ĉi mondo. Kaj tio konsolas dum tristaj tempoj, tion transdoni al posteuloj indas kaj necesas ĉiam denove.

La 21 ukrainaj popolaj fabeloj en tiu ĉi libreto instigas kompari kun popolaj fabeloj de aliaj nacioj. Similaj, nome, aŭ eĉ egalaj troveblas ekzemple en la germana fabeltrezoro (Erinaco kaj Leporo; Vulpino kaj Gruo; Rulkuketo . . .).

La unua duono de la fabel-kolekto prezentas specon, kiu montras pere de bestoj homan sintenon. Tiuj fabeloj kvazaŭ estas spegulo, povas preskaŭ esti konsideritaj fabloj. En la dua duono oni trovas pli da agado. Tie estas, kiel supre menciite: bonaj ecoj venkas malbonajn, malriĉuloj konkeras sian rajton kaj plejbelulinon kontraŭ riĉuloj, avido estas punata, nepriskribebla stulteco kaj letargio karakterizitai. ktp.

Tipan ukrainan fabelan figuron (kiel ekz. „Trolo" en norvegaj kaj svedaj fabeloj) oni ne trovas en la malgranda kolekto. Eble ĝi aperos en planitaj sekvontaj kolektoj.

La libreto pro sia simpla kaj klara lingvo estas bonega legaĵo por komencantoj. Bedaŭrinde enestas tro multe da preseraroj.

Monika Ludewig

Recenzoj

Semjonova, Z. V.; Isajev, M. I.: Lernolibro de la lingvo Esperanto (Učebnik jazyka Esperanto). Eldonejo „Nauka", Moskva 1984. 264 paĝoj.

Temas pri la unua ampleksa lernolibro de Esperanto, kiu aperis en Sovetio post la Dua mondmilito kaj kiu alcelas larĝan studentaron kun mezlerneja ĝenerala klereco. Sisteme la aŭtoroj gvidas interesulon tra enkondukaj laŭlecionaj tekstoj, diversaj ekzercoj, taskoj kaj amuzajoj al la kapablo, sukcesplene kaj memstare okupiĝi pri aldonita krestomatio; ĉi tiu krestomatio entenas sur ĉirkaŭ 50 paĝoj ekzemplojn el publicistiko, scienco, prozo kaj poezio.

La unuopaj lecionoj estas konstruitaj laŭ indukta metodo; tio signifas, ke la lernanto estas devigata ekkoni el la teksto la rolon de difinita gramatikaĵo, kiu estas menciita kiel titolo de la koncerna leciono. Li povas konvinkiĝi pri la ĝusteco de siaj konkludoj per enrigardo en apartan ĉapitron de la lernolibro, en la gramatikon (40 paĝoj); ĉi tie la plej gravaj reguloj rilate al morfologio, vortfarado kaj sintakso estas vicigitaj laŭ la lecionoj.

Krome la lernolibro ofertas:

1. du vortaretojn; la unua (rusa — esperantlingva) limiĝas je la vortoj, kiujn oni bezonas por plenumi la tradukekzercojn ene de la lecionoj (el la rusa lingvo en Esperanton); la dua (esperantlingva — rusa, 24 paĝoj) enhavas ĉirkaŭ 1 600 radikojn, kiuj estis elektitaj n e nur (mi aplaŭdas!) laŭ la vidpunkto de t. n. „vortofteco";

2. ilustrajn tabelojn (ankoraŭ sen paĝciferoj) je la temoj: hejmaj kaj sovaĝaj animaloj (bedaŭrinde la plej fidelan akompananton de la homo la aŭtoroj forgesis: la hundon!; kaj por eviti hazardan intermikson de du similsonaj animalojnocioj mi petas pri plenrajtigo ankaŭ de la ansero, ĉar la anaso jam rajtas sur la tabeloj koketi en esperantlingva medio!), birdoj (mi rekomendas envicigi en la liston de birdoj apud la kolombo la kolimbon por konsciigi la „malgrandan" diferencon kaj por prepari al la verko de Gorkij „Kanto pri la albatroso"), loĝejo, personaj objektoj, homa korpo (kompreneble nur vira, kaj eĉ tia partete — vestita).

3. antaŭparolon (inkluzive kelkajn metodikajn konsilojn); ĉi tie interalie substrekatas, ke ĉiu litaratura lingvo disponas je artefaritaj eroj, kian gravan rolon ludas internaciaj vortoj en la normala komunikado per etnaj lingvoj kaj ke la internaciaj vortoj treege kaŭzas la sukceson de Esperanto, kiel oni devas kompari la fundamentecon kaj samtempe la evolupotencon de Esperanto. En du punktoj laŭ mia opinio la aŭtoroj troigas resp. tro subjektive juĝas, skribinte: „Tiamaniere aperis **simpla, logika, facile lernebla kaj belsona lingvo"** kaj „Kelkaj sciencaj gazetoj (ruslingve: rjad naučnych jurnalov) enhavas esperantlingvajn artikolojn aŭ resumojn" (p. 5) (substrekoj — T. D.).

La enhavoj de la unuopaj tekstoj (dudek kvin lecionoj) estas destinitaj al ĉiutagaj temoj, al sciindajoj el la historio, kulturo, geografio, ekonomio de Sovetunio kaj al faktoj pri Esperanto. Tre bona ideo de la aŭtoroj estas, enmomorigi al la lernanto novajn gramatikaĵojn per proverboj, entenantaj ĉi tiujn novajn formojn kaj samtempe donantaj valorajn eksterlingvajn, homajn spertojn. Mi nomas kelkajn el ili, por ke niaj kursgvidantoj tuj povu eluzi tian instruvojon:

— Kiaj kolegoj, tiaj kutimoj (pluralo)
— Kiu volas, tiu povas (prezenco)
— Por malsana homo forto,
por lokido morto (sufikso -id-)
— Vivu, progresu,
sed lerni ne ĉesu (imperativo)
— Kiu venas plej frue,
sidas plej ĝue (superlativo)
— Pli bone kokino posedata ol bovo posedota
(pasivaj participoj prezenca kaj futura).

La lernolibro estas lerte aranĝita kaj kongruas kun la oficialaj eduk-klerigaj celoj, kiuj validas ankaŭ en la instruado de etnaj fremdaj lingvoj en socialisma ŝtato. La enhavtabelo (p. 264) listigas la lecionojn n u r laŭ ilia vicordo kaj ne indikas la enhavajn aŭ gramatikajn temojn — tio estas pliboniĝenda afero. Enkadre de „Gramatiko al la lecionoj" (p. 121 — 161) la aŭtoroj neniam atentigas al ŝajnaj malregulaĵoj (ekzemple rilate al la neuzo de sufiksoj kiel -il- aŭ -ist- en radikoj, kiuj jam per si mem signifas instrumenton aŭ profesion). Mi subtenas la starpunkton de Semjonova kaj Isajev, ke dum la lernado de Esperanto estu konsideataj la antaŭscioj de la lernantoj en la gepatra resp. dua gepatra lingvo; menciindas, ke oni ofte trovas komparon inter paralelaj aŭ kontraŭaj konstruoj en la rusa lingvo kaj en Esperanto.

Prilingvaj rimarkoj: Por demonstri la prononcon de la litero „ĝ" ankaŭ taŭgus rusaj prefiksigitaj vortoj kiel „podžatj" aŭ „podžidatj" (p. 9); la frazo „Jura levas sian manon" (p. 46) supozigas, ke Jura estas handikapule-unumanulo; la skribmariero „ha lo" (en du vortoj) (p. 50 k. a.) estas nekutima; en la vortlisto sur paĝo 56 la vorto „kino" estu anstataŭigita per „kinejo"; ne kontentigas min la duonkonsekvenca esperantigo resp. neesperantigo de propraj nomoj, ĉar unuflanke la aŭtoroj esperantigas ilin — ekz. Bajkalo, Angaro, Kremlo, Moskvo, Odeso, Sofio, Ermitaĝo, Nevon —, aliflanke estas konservitaj la originalaj formoj — ekz. Vladimir, Nina, Lenin, Oruĵejnaja Palata, Sigulda, Kaŭnas, Riga, Zamenhof, Neva, Smolnij).

Resume: la recenzita lernolibro donas ankaŭ al kursgvidantoj en aliaj landoj valorajn instigojn por pliriĉigi la instruprocedon.

d-ro Till Dahlenburg
GDR—2722 B r ü e l
Straße der DSF 13

Recenzoj

Tofalvi, Eva; Knichal, Oldřich:
Kiuj semas plorante . . .
Originala romano. Universala Esperanto-Asocio
Rotterdam 1984. 108p. Prezo: 15gld.

En 1980 la romano „Kiuj semas plorante . . ." de la geedzoj Tofalvi/Knichal gajnis la Premion Raymond Schwartz por proza fikciaĵo. UEA nun aperigis la verkon libroforme. La libro rolas dum la dudekaj tridekaj jaroj en fikcia lando ie en Eŭropo, „Germanio estas sufiĉe malproksime" (p. 37). Stefan Bende estas militorfo, kiu kristane edukiĝas en abata internulejo. Antaŭ la pastriĝo li forlasas ĝin kaj daŭrigas siajn studojn en universitato. Li aliĝas al neleĝa faŝisma partio kaj laŭ ĝia komisio partoprenas Esperanto-kurson por poste liveri ties membrojn al torturado kaj morto en la karcero de la sekureca polico. Post unujara restado en sanatorio li dum fuĝo estas mortigata de policanoj.

La protagonisto mem rakcntas tiujn epizodojn dum la lastaj tagoj de lia restado en la kuracejo. Tio iom malfaciligas la legadon, ĉar kaj la realtempa rakonto de Bende kaj ties rememoroj estas verkataj imperfekte, do la leganto devas atenti la tempoebenojn.

Finleginte mi ne estis tute certa, kion la aŭtoroj celis, kio estas ilia mesaĝo. La fikcieco de la lando ege malhelpas enordigi la okazajojn. Bende estas eksterordinare kapabla homo, li havas bonegajn rezultojn en la lernejaj kaj universitataj ekzamenoj. Evidente la aŭtoroj intencis skizi homon, kiu sin rigardas senpolitika, sed estas alsuĉata de faŝisma movado kaj fine pereas. Sed Bende estas netaŭga por tiu celo. Eĉ lia streĵo al riĉeco kaj renomo, lia fia karaktero ne klarigas tion. En la komponaĵo troviĝas pluraj kontraŭdiroj: „. . . mi min trejnis — provadis rideti, afable grimaci antaŭ spegulo en la banĉambro. Dum miaj lernojaroj mi tute ne havis malamikojn, sed mi malutilis laŭpove al ĉiuj . . . Mi preparis strategion . . ." (p. 14). Sed post jaroj tiu homo konstatas, ke en lia vivo „ŝlosiloj estis ĉiam en la manoj de aliuloj" (p. 64)! Post la legado de la Hitlera „Mein Kampf" li tuj aliĝas al ties ideoj. Tiu aliĝo al la faŝismo ne estas kredinda. La romano n e komprenigas, kiel kristane edukita homo kun altaj matematikaj kaj filologiaj scipovoj trovas tiun vojon. Poste, en la Esperanto-grupo, oni taksas lin „humanisto, al kiu ne estas indiferenta la estonteco de la Eŭropa kulturo" (p. 87).

Same la furiozo, per kiu la sekureca polico (kiu evidente troviĝas tute sub la influo de la neleĝa partio!) persekutas la esperantistojn, simple estas nereala. Ĉi tie oni ŝajnigas politikecon kaj signifon de la E-movado, kiun ĝi neniam havis.

La lingvajo estas senriproĉa kaj flua, tamen kelkfoje iom peza. Iuj kunmetaĵoj kiel „malsekretigi" (p. 67) emfazas tion. La uzo de vortoj kiel „amikĉjo" (p. 18) kaj „Stefĉjo" (p. 43) elmontras la dubecon de la kares-sufikso. Antaŭnomoj estas esperantigitaj, same la nomo „Hitlero" (p. 33). La aŭtoroj ne montris grandan inventemon rilate al nomoj de la rolantoj. Ili sonas tre egale kaj estas malfacile distingeblaj (ĉu intence?): Bende, Pander, Varda, Korda, Pardi, Orban . . .

La romano estas havinda kaj leginda, sed la leganto zorge kaj prudente digestu la enhavon.

Michael Lennartz

Internacia Komputado. Jarkolekto 1984. Eld. HEA/SEC Budapest 1984. 4 kajeroj po 64 paĝoj. Jarabono: HU 400 Ft., GDR 24 M, UEA 24 gld.

La unua jarkolekto de „Internacia Komputado", la komputerteknika revuo el Hungario, estas komplete disponebla. Post kvin kajeroj (inkluzive de provkajero el 1983) eblas unua pritakso.

La ekstera aspekto (krom la miaopinie fuŝa titolpaĝo) kaj preskvalito estas plaĉaj, eĉ la formaton mi taksas pli avantaĝa ol tiu de aliaj A4-revuoj. Multaj (spritaj) desegnoj kaj diagramoj, kelkaj fotoj faciligas la legadon. El tiu vidpunkto IK sendube estas prezentebla al neverda publiko.

La enhavon mi juĝas pli kritikeme (kaj oni komprenu tion kiel konstruivan kontribuon al pliperfektigo). La redakcio de IK devas solvi tre malfacilan taskon — kompili revuon por fakuloj, kiu tamen estu legata ankaŭ de laikoj (ĉar sole fakuloj ne garantias sufiĉan eldonkvanton, kaj ĉar la komputero proksimiĝas al homo), kaj revuon pri la tuta fako „komputeroj" de la plej grandaj ĝis la plej malgrandaj. Nacilingvaj revuoj kutime ne havas tian larĝan spektron, sed disdividas la fakon, inter si. Krome IK sin komprenas kiel peranto inter „grandpotencoj" kaj malgrandaj, lingve izolitaj landoj.

Tial la leganto trovas en IK iomete el ĉio. Eble tio estas ĝia ĉefa ŝanco konkeri firman lokon inter la amaso de nacilingvaj revuoj. La ĉeftemoj (Mikrokomputilo, Retoj, Tekstoprilaboro, Datumbazoj, Programada Teknologio) ĝis nun estis plejparte traktataj laŭ spertoj per grandkomputeroj. Mi persone preferus pli fortan atenton al mikrokomputeroj (prezentado de hejmkomputeroj, programoj, skemoj de periferiaj instalaĵoj, memkonstruitaj komputeroj) kaj problemoj de programado (mi instigus kurson pri programado por komencantoj), ĉar tio estus vojo al pliigo de la legantaro. Sed ĝi jam nun meritas lokon en la abonplano kaj biblioteko de ĉiu esperantisto, kiu sentas neceson okupiĝi pri komputeroj.

Michael Lennartz

Recenzoj

Rokicki, Ryszard (Red.): Acta Interlinguistica. Scienca Interlingvistika Simpozio. Eld. Akademickie Centrum Interlingwistyczne, Varsovio 1984, 160 p.

Verŝajne ne ĉiam sufiĉe aprezata jam pli ol 10 jaroj studentoj ĉiujare okazigas interlingvistikajn simpoziojn. Bedaŭrinde ĝis nun ne aperis presitaj la referaĵoj. La prezentata volumo estas plejparte la rezulto de la 11a simpozio (1983).

La volumo entenas tre diversnivelajn kontribuojn. **Věra Barandovská** iom supraje demandas pri la objekto de interlingvistiko kaj pli malpli vidas en Esperanto aŭ planlingvoj la objekton. **François Lo Jacomo** donas resumon de sia disertacio prezentante sinkronojn simptomojn de la evoluo kaj distingas inter evoluo kaj pliriĉiĝo, laŭ mi ne tiel maldialektike disigebla. **Tyburcjusz Tyblewski** klopodas skizi la „personecon de esperantistoj", entrepreno certe ne akceptebla tiel, ĉar „la esperantisto" ne ekzistas kiel aparta homtipo. En alia kontribuo **V. Barandovská** donas bazajn informojn pri Komenio kaj lia ideo pri internacia lingvo, aparte pri Panglottia. **Jerzy Leyk** prezentas bazajn elementojn de la tiel nomata „genera lingvistiko" de Chomski, (kaj adeptoj), iam ege moda sed jam pli malpli forkritikita. I. a. la pseŭdoscienca terminologia aparato kaj la vana provo matematikigi lingvon longe allogis homojn ne tro konsciaj pri la socieco de lingvo. Ne klariĝas el la kontribuo, kion Esperanto povus preni de aŭ doni al la „generismo". **Francisko Simonnet** tre pensostimule verkas pri la demando „Ĉu la lingvoj devos evolui" kaj aparte elstarigas la rolon de priskribo kaj instruado de la lingvo je ties evoluo. Pli sistemeca kaj malpli retorika trakto de la temo estus bonvena kaj krome, kiel montris la registrita diskuto (p. 145 — 149) iom malpli bombasta uzo de indifinitaj terminoj. Tre prave **Michel Duc Goninaz** montras, ke lingvosciencaj kaj gramatikaj difinoj de PIV bedaŭrinde ne montras grandan koherecon. Cetere, estus bonvene kaj eĉ urĝe necese, ellabori komparan esperantologian terminaron por iom plifaciligi la orientiĝon en la ĝangalo de lingvistikaj terminoj, des pli, ĉar ankaŭ inter esperantologoj disvastiĝas la kontraŭscienca manio uzi iujn (ĉu membakitajn, ĉu ie transprenitajn) terminojn, tute sen ie difini ilin. **Bernard Golden**, arkeologo, analizas kelkajn PIV-terminojn el la arkeoolgio, prahistorio, antropologio, etnografio, kvaternara geologio, paleontologio kaj arketekturo. La kontribuo ankaŭ por laikoj estas aparte interesa pro la aplikita prezentometodo. **Antoni Golonka** prezentas de sia laboro pri maŝina generado de esperantistaj vortoj. Tre interesa temo sed danĝera, se oni forgesas, ke signifo de vorto ne nepre estas identa kun la sumo de la signifoj de la vorteroj. Nur rilato al la realeco vortigenda donas al strukturo enhavon. Ekz. la generita vorto „amulo" havas neniun signifon, se ne ekzistas socie motivita bezono (aŭ konvencio) por doni al ĝi signifon. **Balász Wacha**, Sándor Révész kaj Ryszard Rokicki traktas pri morfemoj (radikoj) en Esperanto kaj montras interesajn aspektojn de la ofte diskutita temo. Tamen — oni ne forgesu, ke la vortteorio de R. Saussure, Wüster kaj Kalocsay estu rigardata kiel helpmodelo por prezenti funkciadon de la Esperanta vortkreado. Didaktikan elementon al la temaro aldonas Barbara Jedrzejczyk-Rokicka per sia tre interesa kontribuo pri lernmotivigo de Esperanto, kiu finiĝas en la bedaŭrinde ĝenerale subtaksita problemo „La Esperanto-movado povas kaj devas mem decidi por kiaj persontipoj ĝi deziras esti alloga" (p. 156). Interesa aldono al jam kelkaj lingvostatistikaj esploroj de Esperanto estas la komuniko pri lingvometriaj esploroj de Zbignew Kornicki. La volumo digne enviciĝas en la aron de pli kaj pli ofte aperantaj simpoziaj kontribuoj. La poloj nepre daŭrigu tiun serion.

Detlev Blanke

Strugar, N./Sekelj, A.: Leksikono de socipolitika kaj memadministra terminologio, serbkroata-esperanta. Zagreb (Internacia Kultura Servo), 1983, 190 x 140, 49 p. broŝurita.

Parolante pri terminologio oni ofte nur pensas pri scienc-teknikaj temoj kaj forgesas la socipolitikan realaĵon. Multege da tiaspeca materialo entenas el la pasinteco i. a. tiaj revuoj kia la Internacia Socia Revuo, la Nova Epoko, Sennaciulo, Internaciisto, Popola Fronto, post la milito aparte Internacia Kulturo, El Popola Ĉinio, Nuntempa Bulgario, Hungara Vivo kaj Monato.

Kompreneble la uzita kaj uzata lingvaĵo tre diferencas laŭ la politika profilo de la koncernaj revuoj. Bezonon pri apartaj registroj de la socipolitika leksika materialo ni trovas jam ĉe la laboristaj esperantistoj kaj en Soveta Unio dum la 20aj jaroj. Rublov[1]) kolektis kaj sistemigis socipolitikajn leksikajn grupojn kaj Muravkin/Nonnemann klopodis en sia LEA-Vortaro[2]) Esperanto-Germana aparte konsideri la politikajn esprimojn.

Sed ĝis hodiaŭ mankas vere uzebla socipolitika vortaro de Esperanto. La en PIV entenataj terminoj kaj difinoj ofte estas tre mankhavaj kaj dubindaj[3]). Do pro tio la apero de la tre modestampleksa vortaro en Zagreb estas aparte salutinda. Ĝi estas verkita de Novak Strugar per la revuo „Aktualaj Problemoj de Socialismo" kaj tradukita de Antonije Sekelj. La glosaro estas adaptita al la jugoslavaj bezonoj, aparte konsiderante la sistemon de memadministrado. Tamen, jena konstato el la prefaco ĝenerale validas: „Granda nombro da esprimoj kaj nocioj, uzataj en nia socipolitika praktiko jam estas adaptita al aliaj lingvoj. La esperantistoj ĝis nun nenie povis trovi adekvatajn esprimojn por ili kaj ĉiu tradukanto tradukis ilin laŭ sia bontrovo tio kreis tre ofte gravajn miskomprenojn, ni povas atendi, ke ili enradikiĝu ankaŭ en Esperanton".

La leksikono entenas pli ol 1 500 esprimojn.

[1]) S. Rublev: Paĝetoj de sistem-vortaro. En: Izvestija CK SESR. Moskvo, N-ro 1—12 (1926 — 1927)

[2]) H. Nonnemann/H. Muravkin: LEA-Vortaro Esperanto-Deutsch. Berlin 1933

[3]) Vidu mian recenzon pri PIV en „der esperantist", **5**, Nr. 44 (novembro-decembro 1970)

Detlev Blanke

Recenzoj

Petko Arnaudov / Ljudmila Arnaudova: Amuza matematiko por gelernantoj. Budapest 1984, Scienca Eldona Centro, ISBN 9635711298, 99 p.

La verko eldoniĝis en 1981 en la bulgara, estis tradukita de la aŭtoroj mem en Esperanton kaj jam en 1984 publikigita de Scienca Eldona Centro Budapest kunlabore kun UEA kaj HEA.

La libreto entenas konsilojn kaj instigojn kiel aranĝi matematikajn studrondojn interesaj kaj altiraj. La aŭtoroj donas tiucele ĝeneralajn rekomendojn, sed la ĉefa parto de la verko konsistas el konkretaj taskoj kaj ekzemploj por la diversaj lernojaroj. Krom multaj matematikaj figuroj bildoj de famaj matematikistoj kaj invitafiŝoj kontribuas al la plaĉa aspekto de la bone redaktita kajero.

En la ĝenerala parto la instruista geedza paro atentigas la leganton pri kolekto de interesa materialo (taskoj, enigmoj, ludoj, biografioj) kaj pri la inkludo de aliaj natursciencaj fakoj en la programon. Gravan signifon por la sukceso de tiaj aranĝoj ankaŭ havas la preparo de la ĉeestontoj (afiŝoj, tabuloj, anonco de premioj) kaj alloga finiĝo de la kunveno: danco kaj muziko.

Grupigitaj laŭ klasoŝtupoj (5-a kaj 6-a, 7-a kaj 8-a klasoj, 9-a klaso, 10-a kaj 11-a klasoj) la verkintoj prezentas modelojn de matematikaj kunvenoj. Apud interesaj taskoj, konkursoj, sofismaj teatrajoj, rakontoj pri sciencistoj kaj kuriozaĵoj estas proponitaj. En apartaj ĉapitroj la aŭtoroj kolektis sentencojn de konataj matematikistoj, poemojn pri matematiko, anekdotojn pri sciencistoj de Eŭklid, Gauss ĝis Wiener .La finon formas sekcio kun respondoj kaj solvoj al kelkaj taskoj.

La lingvo kaj la ekzemploj estas klaraj kaj mi trovis nur malmultajn preserarojn en la teksto (p. 14: lotarie anstataŭ loterie; p. 34, 35: merteloj anstataŭ marteloj; p. 72: cirklo anstataŭ cirkelo) kaj neniujn en la matematika parto. La libro povas servi al pedagogoj kaj gelernantoj. Ĝi estas rekomendinda al ĉiuj interesatoj.

M. Schüler

Albert Lienhardt: Amuza legolibro en Esperanto, Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1984

Kursestroj kaj memlernantoj kun baza scio en Esperanto certe bonvenigas tiun neordinaran legolibron eldonitan de Hungara Esperanto-Asocio.

Estas malnova saĝajo, ke la lernanto pli bone lernas, se li volonte lernas. La sperta franca pedagogo Albert Lienhardt, kiu jam populariĝis per sia ankaŭ de HEA eldonitaj „Amuzaj dialogoj", evidente supozas, ke tiu volonte lernas, kiu amuziĝante lernas. Laŭ tiu devizo li kompilis 100 ŝercajn rakontetojn. Tradukinte kaj prilaborinte ilin, li aplikis konsekvence kaj skrupule 12 en la antaŭparolo klarigitajn kriteriojn por ricevi legajojn en simpla kaj facile komprenebla Esperanto. Ekzemple li uzis malkomplikan stilon, preferis la vortmaterialon bezonatan en ĉiutaga vivo, evitis neologismojn kaj maloftajn fakterminojn, malklarajn kaj pezajn vortkunmetojn, kaj nur en nepra neceso li utiligis participojn kaj akuzativon. Dank' al tiu konscia lingva formado de la rakontetoj, ilia gradigo kaj dank' al la aldonitaj 2 000 didaktitaj demandoj kaj respondoj ni nun disponas pri nova utila instru- kaj lernmaterialo. Kvankam la aŭtoro ne aldonis vortareton, ne aldonis gramatikajn indikojn kaj nur rare en la antaŭparolo donas metodikajn indikojn, tiu legolibro valoras. Memkompreneble tia kolektajo de ŝercaj historietoj, plejparte spritaj pro infanaj miskomprenoj, nur povas esti unu apud aliaj instruiloj kaj lerniloj, ĉar la lernanto devas alpropriigi al si la tutan multflankecon de la lingvaj rimedoj. Al la progresinta komencanto tiu ĉarma legolibro, gaje ilustrita de la hungara karikaturisto Istvan Endrödi, tutcerte faciligas la lernadon de nia lingvo.

Fritz J. Wollenberg

Radio Polonia

Radio Polonia disaŭdigas ĉiutage ses elsendojn en la lingvo Esperanto!

Radio Polonia disaŭdigas en Esperanto ĉiutage de pli ol 25 jaroj; la 4an de aprilo 1984 oni festis la 25jariĝon de la agado kaj la 14an de aprilo 1984 oni aŭdigis la 25milan elsendon.

En la disaŭdigoj apud novajoj, komentarioj pri polaj kaj internaciaj temoj, oni parolas pri soci-ekonomiaj, scienc-teknikaj, kulturaj, turismaj, junularaj, sportaj kaj muzikaj temoj, kaj ankaŭ tre vaste pri la E-movado en Pollando kaj en la modo. Uzante la okazon ni deziras rememorigi, ke en niaj elsendoj ni dediĉas multe da atento al polaj kaj E-movadaj temoj. Ni invitas vin al kunredaktado de la elsendoj. Ni proponas nome, ke vi sendu al ni liston de la proponataj de vi konkretaj temoj polaj kaj E-movadaj, kiujn — laŭ via opinio — ni devus pritrakti en la proksima estonto. La listigitajn temojn sendu sur aparta paperfolio, sed en la sama koverto. Fariĝu kunredaktoro de viaj Esperanto-elsendoj!

Se vi bezonas stokon da program-informiloj pri niaj E-elsendoj por via E-klubo, E-kurso, k. t. p., tuj skribu al ni. La program-informilojn ni sendas senpage. Nia adreso: Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, 00-950 Varsovio, Box 46, Pollando.

La horoj kaj ondolongoj:

5,30 — 6,00 41,27; 48,90; 50,04; 200 m (7270, 61-5, 5995, 1503 kHz)
11,00 — 11,25 31,50; 41,99 m (9525, 7145 kHz)
15,30 — 15,55 31,01; 41,18 m (9675, 7285 kHz)
16,30 — 16,55 41,18; 49,22 m (7285, 6095 kHz)
19,30 — 20,00 41,18; 49,22 m (7285, 6095 kHz)
21,30 — 21,55 41,18; 49,22; 50,04; 200 m (7285, 6095, 5995, 1503 kHz)

(la horoj estas indikitaj laŭ la universala tempo [GMT], al kiu — en la landoj de la mezeŭropa tempo — vintre oni aldonas unu horon, somere — du horojn); R = reaŭdigo, ripeto.

Ĉu nur esperantistoj estas veraj pacbatalantoj?

En „Sennaciulo" n-ro 10/85, sur paĝoj 74/75 oni legas eltirajon de parolado, kiun faris la prezidanto de UEA, s-ro Grégoire Maertens, antaŭ la 58a Kongreso de SAT en Amersfoort: „Ja, la esperanto-komunumo al kiu apartenas SAT, UEA kaj aliaj instancoj, volas finfine porti la mesaĝon de d-ro Zamenhof al la mondo. Tio estas, ke nia internacia lingvo Esperanto estas ankaŭ instrumento de amikeco kaj de paco. Mi ne fanfaronas se mi diras, ke Esperanto-movado estis la unua vera pacmovado. Kaj ĝi ankoraŭ multe pli bone plenumas tiun rolon ol multaj aliaj movadoj, kiuj svingas per la vorto „paco" en sia standardo. Tiu Esperanto-komunumo volas informi la mondon, ke la internacia amikeco kaj la mondpaco ne estas ebla sen profunda respekto de ĉies kulturo. Tiu komunumo, ni ĉiuj, portas la mesaĝon al la internaciaj instancoj en la mondo, ke la lingva diskriminacio kaj lingva imperiismo portas la ĝermon de malamikeco kaj de malpaco. Mi ne kredas pri la paco kaj amikeco, se ĝi estas esprimita en la tielnomata etna mondlingvo. Ĉu oni povas kredi je la paco kaj amikeco, se oni altrudas samtempe sian propran kulturon kaj propran ekonomion kaj sian propran politikon? Mi ne kredas."

Mi trovas tute prave, ke la prezidanto de UEA elstarigis la porpacan rolon de la Esperanto-movado. Sed mi volas fari jenajn rimarkojn:

1. Mi opinias, ke oni ne povas tiel absolute aserti, ke la Esperanto-movado „estis la unua vera pacmovado". La historio de la porpacaj klopodoj certe montrus, ke tia aserto estas troigita.
2. La Esperanto-movado estis kaj estas tre buntspektra kaj multkomponenta. Jam tre frue la Esperanto-movado havis tre bonajn ligojn al la pacmovado, sed klasifi ĝin kiel tuto kiel „pacmovado" certe ne estas ekzakte.
3. Mi ne trovas bonvena starigi la Esperanto-movadon kontraŭ aliaj pacmovadoj, kvazaŭ nur la Esperanto-movado estus la „vera" pacmovado kaj la aliaj nur „svingas per la vorto ‚paco' en sia standardo". Tiel asertante oni ne konstruas ponton al aliaj bonvolemaj kaj sinceraj pacmovadoj. Hodiaŭ ni vivas en mondo, kiam necesas unuiĝo kaj ne splitiĝo de la pacmovado.
4. Tute nekomprenebla por mi estas, ke la prezidanto de UEA ne „kredas pri la paco kaj amikeco, se ĝi estas esprimita en la tielnomata etna mondlingvo".

Ĉu Gorbaĉov kaj Reagon intertraktu esperantlingve? Ĉu ili evitu paroli ruse aŭ angle pri malarmado kaj konservo de la paco?

D. B.

De la Esperanto-redakcio de Radio Polonia

5mila korespondaĵo en 1985

En 1985 ni jam ricevis pli ol 5 mil korespondaĵojn. Montriĝis, laŭ la kalkulo de nia leterfako, ke la korespondaĵon 4999 sendis Mirdza Burgmeister el Rigo; 5000 Tadeusz Nowak, Francujo; 5001 Juan Antonio Gimenez, Hispanio.

90mila korespondaĵo en la tuta historio de la elsendoj.

En la komenco de aŭgusto 1985 venis la 90mila korespondaĵo en la tuta historio de la E-elsendoj de Radio Varsovio. La aŭtoro de ĉi tiu korespondaĵo estas Joop van der Hoeven, Nederlando; la korespondaĵon 90 001 sendis Norbert Merkens, FRG. Gratulon! N. Merkens malfermis la lastan etapon direkte al la 100-mila korespondaĵo, kiu supozeble venos antaŭ la 100jariĝo de Esperanto. Valoras substreki, ke en la unua jarduono ni ricevis meze 600 — 700 monate (kompare kun 700 — 800 en 1984), sed en la somera periodo ege kreskis la aktiveco de niaj aŭskultantoj, kio esprimiĝis per 1 608 korespondaĵoj en julio, kaj 1 769 korespondaĵoj en aŭgusto. Cetere ne temas nur pri multnombraj korespondaĵoj, temas pri tio, ke la leteroj enhavas valoran materialon, kiu kontribuas al la konstanta plialtigado de la nivelo de la E-elsendoj de Radio Polonia. Estas tre grave, ke la aŭskultantoj ne nur raportas, sed ankaŭ skribas kio plaĉis aŭ malplaĉis kaj kial, prezentas sugestojn por estonte, proponas konkretajn temojn por prilaboro k. t. p. Entute kaj resume: bonega kunlaboro kun aŭskultantoj!

Nova program-informilo

En la komenco de novembro 1985 aperos nova presita programinformilo pri la E-elsendoj de Radio Polonia. La informilo estas senpage havebla ĉe: Radio Polonia, E-Redakcio, Varsovio, Pollando. Ĉe la sama adreso haveblas la informilo „Kiel aŭskulti pli bone"? kun praktikaj konsiloj pri plibonigo de la aŭdebleco.

Eksperimento aŭ io firma kaj konstanta?

Apud la sonraportoj kaj intervjuoj, pli kaj pli ofte aperas liberaj antaŭmikrofonoj interparoloj de niaj geredaktoroj. Ĉi tiu nova formo de la vivanta prezentado de temoj, kiujn oni ne plu legas, sed oni rakontas sen teksto (ekz. Radio-Forumo) estas ankoraŭ eksperimento, de la aŭskultantoj dependas, ĉi tio fariĝos afero (kutimo) firma kaj konstanta.

Kun sinceraj salutoj: La Esperanto-Redakcio de Radio Polonia

Recenzo

Nemere, Istvan: La Monto. Originala Romano. Eld. Hungara Esperanto-Asocio Budapest 1984. 166 pĝ. Prezo: 75 Ft.

Soleca, preskaŭ ekstermonda vilaĝo sur montopinto. Homoj kun vivstilo simila al tiu de prahomoj. Kvar malaperintaj soldatoj. Kaj majoro Reman, kiu serĉas tiujn kvar soldatojn en la menciita vilaĝeto.

Tiu estas la situacio, en kiun kondukas nin Istvan Nemere. Tiu lia ĝis nun lasta romano estas fikcio pri la kunpuŝiĝo de simpla, naturproksima vivo kaj la „civilizacio", sed ankaŭ iomete pri la elformiĝo de realigita justa, komunaĵ-fundamenta socio el la ruinoj de burĝa progresismo. Kiel Reman malkovras la sorton de la soldatoj, lian vivon kun la vilaĝanoj, kian amon — tion Vi mem legu. Tio estas „tipa" Nemere-romano, en kiu estas ligitaj humanismoj politikaj sinteno kaj diskutado kun kreskanta streĉo, kiu fikse tenas la leganton ĝis la iom-post-ioma solvo en tamen surpriza kulmino. „La Monto" certe provokas meditadon kaj opini-interŝanĝon, des pli, ĉar la aŭtoro denove brilas per stilo kaj lerta regado de la lingvo.

Michael Lennartz

El materialo de Kuba Esperanto-Asocio

Ni citas kun permeso de KEA el materialo, kiu donas interesajn faktojn pri la agado de la fora socialisma lando:

Nun (unua semestro 1985) ni havas 1309 membrojn en nia Asocio je Nacia Nivelo, kaj la E-lernejo „L. L. Zamenhof" havas matrikulon da 600 gelernantoj en la tri niveloj, ne enkalkulante 60 gelernantojn en la kompletaj kursoj.

Do, ni konsideras, ke nia laboro bonas kaj plifortigitas ekde la jaro 1981, kiam ni pli forte sentis la moralan kaj materialan apogon de niaj eksterlandaj geamikoj; ĉefe tiu de BEA, kiu ebligas nian partoprenon ĉi tie kaj nian membrigon al UEA; kaj ankaŭ al la hungaroj, kiuj lastatempe sendadas al ni legolibrojn kaj simplajn literaturaĵojn tre utilajn, kiujn ni uzadas por nia perfektigado kaj disvolvo; al la germanoj, kiuj sendadas al ni regule la revuon „Paco" en sufiĉe bona kvanto ebligante al ni distribui ilin al provincoj kaj rondoj; kaj ĝenerale al ĉiuj socialismaj landoj, ĉar literature ili subtenas nin.

Krom la ĉefan E-lernejon „L. L. Zamenhof" en Havano, ankaŭ E-lernejojn ni havas en 8 provincoj kaj en 14 municipoj. En tiu ĉi jaro ni intencas alporti Esperanton en kvin aliajn distajn kaj proksimajn lokojn en nia lando. La kvanto da membro-lernantoj ĉi-momente estas da 1120 atentataj de 78 geinstruistoj.

La E-rondoj estas la bazaj unuoj de KEA, ili estas: Scienc-Teknikaj Rondoj; Pac-Rondoj; Junularaj Rondoj.

Aparte ĉiu rondo prilaboras laborplanon por la jaro kaj submetigas ĝin al la konsidero kaj aprobo de la Municipa Estraro. Rondoj devas sekvi la orientiĝojn alvenintajn el la Nacia Estraro de ĝia Sekcio por fari la laborplanon. La Municipaj Estraroj superrigardas kaj konstatas la plenumon de la laborplano. La rondoj ĉe ni ne estas la komenco, sed la celo; la esperantistoj naskiĝas en la lernejoj kaj disvolviĝas en la rondoj.

La Scienc-Teknika Sekcio (STS) zorgas kaj celas la aplikon de E-o en la diversaj brancoj de la homa scio. STS konsistas el Centraj Rondoj, kiuj sidejas en Havano. Ili atentas ĉiujn Scienc-Teknikajn Rondojn; provincajn kaj/aŭ municipajn laŭ la kazo kaj la reala bezono.

La Pac-Sekcio (PS) celas ĉefe la plenumadon de unu el la plej gravaj principoj de KEA; defendi la sendependecon, la liberecon kaj suverenecon de la popoloj, la pacon, la amikecon kaj kunfratiĝon de la homaro. Konsistas ĝi el Rondoj Provincaj kaj Municipaj.

La Junulara Sekcio (JS) sindediĉas diskonigi la Internacian Lingvon inter la gejunuloj (ĝis 30-jaraĝaj) kun speciala atento kaj emfazo al ilia antiimperiisma kaj internaciisma edukado, ĝi ankaŭ zorgas kaj gvidas la Interes-Rondojn por junpioniroj en unuanivelaj kaj meznivelaj lernejoj. JS konsistas el Rondoj Provincaj kaj Municipaj partoprenigante la membraron en ekskursojn, tendarojn, kulturajn aranĝojn kaj aliajn aktivojn proprajn por gejunuloj, kvankam en tiuj aktivecoj povas ĉeesti ankaŭ nejunaj kaj maljunaj gesperantistoj.

La Direkcio pri Esperanta Instruado (DEI) celas instruigi la interesiĝantojn. Por funkcii DEI esploras ĉiun eblecon ĉie, kreante kondiĉojn por starigi lernejon kie eblas kaj kie ne eblas pro manko de geinstruistoj, ĝi entreprenas Kurson per Renkontiĝoj. En tiuj kursoj la gelernantoj aĉetas la lernmaterialojn kaj membriĝas al KEA, kaj unu-du fojojn ĉiumonate E-instruisto vizitas ilin, kiuj lernas memstare, kaj kontrolas la lernadon, klarigas eblajn dubojn kaj paroligas ilin. DEI zorgas la kvaliton de la E-instruado kaj ties bonan funkcion. En Nacia, Provinca kaj Municipa instanco DEI kalkulas je kvin departamentoj: Docenta, Metodologia, Ekonomia, pri Materialo kaj pri Disvolvo. DEI estas ĉimomente la plej grava Direkcio de KEA, ĉar pere de ĝia senĉesa laborado kaj traserĉo kreskas la nombro da lernejoj en la lando, pro ĝia zorgateco stabiliĝas kaj organizite funkcias la E-lernejoj kaj la esperantistoj en la plej apartaj lokoj nialande sentas sin atentataj. Direktoro de DEI estas Jesus Castillo (Hesus Kastiljo) teknikisto pri klimatizado de la medio. Li estas tute nova kadrulo kaj lia laboro ege meritindas.

La Direkcio pri Eldonado (DE) laboras rekte en la pretigo de la E-materialo kun sufiĉa kvalito kaj ankaŭ ligas kontaktojn kun eldonejoj kaj presejoj tiu-cela.

La Direkcio pri Servo (DS) atentas la vendadon kaj interŝanĝon de libroj, revuoj, sondiskoj k. t. p. kaj peras tradukistajn servojn kaj ankaŭ servigas la bibliotekon.

La Direkcio pri Aranĝoj (DA) celas partoprenigi ĉiujn esperantistojn en kulturajn, sportajn kaj turismajn aktivojn. Sekcioj kaj Rondoj rajtas peri de ĝi tiajn aferojn.

Unua Esperanta libro el Kubo: Fidel Castro: La historio absolvos min.

Eldonis: Fremdlingva Eldonejo José Marti kune kun la Entrepreno Ediciones Cubanas. La 26an de julio 1953 estis atakata la dua plej grava fortikaĵo de Kubo, la kazerno Moncada en Santiago de Cuba. Fidel Castro Ruz, tiama juna revolucia advokato, estis la ĉefo de la grupo, kiu efektivigis la atakon. Ĉi tiu ago celis faligi la sangan diktaturon de Batista, sed ĝi ne sukcesis kaj kelkaj revoluciuloj mortis dum la batalo kaj multaj aliaj estis murditaj tuj post la aresto. Monatojn poste, en la juĝo pro tiuj okazintaĵoj, Fidel Castro prenis sian propran defendon, denuncis la korupton, perfortojn kaj murdojn far la diktaturo kaj sciigis la programon, kiu estus plenumata de la Kuba Revolucio se ĝi venkintus. Ĉi verko enhavas tiun famkonatan paroladon.

Rimarko de la redakcio:

GDREA mendis la titolon pere de la Internacia Librovendejo en Berlin.

KORESPONDDEZIROJ 31635

Ni publikigos nur tajpitajn koresponddezirojn!

Alĝerio

Boumediene Djamel, B. P. 432, **Tlemcen,** Alĝerio (naskiĝis en 1961) estas studento kiu talente lernas Esperanton.
Dahmani Mohamed, Rue 560 No. 16, **Nedroma,** wilaya de Tlemcen 13, Alĝerio. Li estas 23-jara studento pri administrado.

Benino

Dokoui Eric, s/c W. Bernard, P.T.T. **Aplahoué,** Benino. Li estas proks. 18-jara lernejano, kaj kreis mem Esperanto-klubon en kiu li nun tre aktivas.
Akpa François estas la kamarado de Eric Dokoui, samlerneja, samaĝa, samkapabla, samentuziasma. Lia adreso: s/c Fangnon Jacqueline, Institutrice à l'Ecole de Base de Cadjéhoun, Groupe „C", B.P. 434, Cotonou, Benino.
Zocli Francis, Ets. Comodel, **Dogbo**-Marché (Mono),Benino, jam bone scias Esperanton, kaj siavice nun instruas al gejunuloj en kaj ĉirkaŭ Dogbo. Por ili li serĉas korespondantojn, kiuj estu pretaj skribi tre simple al la komencantoj.

Gambio

Ian White estas juna brito, instruisto en St. Augustine's High School, P.O. Box 463, **Banjul,** Gambio. Klaso de 25 studentoj ek de 1985 serĉas kontakton kun (prefere) Esperanto-klubo alilanda, sed ankaŭ individua korespondado estas bonvena.

Gano

D-ro Akwasi Owusu Osei Komfo Anokye Teaching Hospital, P.O. Box 1934, **Kumasi,** Gano, estas 26-jara kuracisto.

Kamerunio

Hiag Ekanga I-er, s/c M. Bell Jacques, B. p. 1323, **Douala,** Kamerunio, finis la lernejon, kaj lernis Esperanton sufiĉe bone.

Maroko

Mohamed Elmenani, W. G. C. Complexe 61, Clapet 41, 46ème Arr., Mansor III, Cité Bernoussi, **Casablanca** Cedex 5. Li studas en teknika lernejo pri industria mekaniko, estas 23-jara, scias ankaŭ la araban, francan kaj anglan lingvojn.

Madagaskaro

Jaonathana Marie-Honorette, Logt. 1876/1-bis Cité 67 Ha, Antananarivo, 101 Rep. Dem. Malagasy, Madagascar, estas studentino 25-jara, talenta lernantino de Esperanto, kiu volas korespondi pri sporto, muziko, vojaĝoj, filmoj, libroj, kun: viro 27 ĝis 40-jara, virino 25 ĝis 30-jara, aŭ geedzoj nejunaj.

Togo

Foley A. Ekué, B.P. 13528, **Lomé**-Nyekonakpoe, Togo, entuziasme lernas Esperanton kaj eĉ klopodis fondi klubon en Lomé. Li laboras en elektronika laborejo kaj vespere studas por radio-tv-teknikisto. Li deziras korespondi pri sia fako.
„Estas kvar monatoj kaj mi skribas kaj parolas Esperanton. Esperanto estas facila lingvo." Tion skribis en novembro 1984 s-ro Mensah B. A. Agbemadon, C. E. G. de Zalivé, B. P. 134, **Aného,** Togo.
Boko Yaovi-Saleck loĝas provizore ĉe sia onklo: s/c ASSOTI A. Mahasso, B. P. 1334, **Lomé,** Togo. En la granda urbo li serĉas laboron, eĉ esperas lerni metion. Li jam ne plu vizitas lernejon, sed lernas Esperanton perkoresponde.

Burkina Faso

Oumarou Sidibé, B. P. 231, Banfora, Burkina Faso (antaŭe: Voltio), nask. en 1958, publika skribisto en sia vilaĝo, lernis Esperanton dum pli ol unu jaro.

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16